NIP FR 1007

BULTENO DE LIBERA PENSO

(SENS)

Scanné avec CamScanner

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

In'ernacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1908-1909. — N° 12. Aùgusto

## Klerika kontaûleĝa Persekutado de senkonfesaj Instruistoj en Aûstrio

Ankaù la Aùstria leĝo (1867) garantias al ĉiu regnano liberecon de kredo kaj konscienco: la ĝuado de rennanaj kaj politikaj rajtoj ne devas dependi de eklezia konfeso. Sed kiam en lasta tempo bohemaj instruistoj S-roj Pelikan, Laube, Vildomec kaj F-ino Kaderabkova uzis tiun rajton deklarinte sin senkonfesaj, la imperiestra reĝa Landa Lerneja Konsilantaro en Bohemujo kaj Moravio pensiumis ilin. La katolika estraro ne povante apogi sin sur klara kaj justa leĝo fine eltrovis ruzan argumenton: la instruisto deklarinta sin senkonfesa perdas ĉe gepatroj de infanoj per li instruataj konfidon, kaj tiel fariĝas netaùga por sukcesa funkciado en lernejo. Principo tre danĝera ne nur por instruistaro sed ankaù por ceteraj profesioj, kiu iniciatas rajtan necertecon kaj laùvolon. La konfido de regnanoj estas ja tre ŝanĝema kaj ofte dependas de civilizacia stato de loĝantaro. Sed la puno ne atendis longe. La progresemaj gepatroj, kiujn oni tute ne demandis pri ilia opinio, ĉesas toleri similan ruzecon, kie ili devas ludi rolon de autaùtuko de malhonestaj faroj. Antaù la persekuto de instruisto V. oni organizis kunvenon prezidatan de vilaĝestroj, kie oni subscribis kaj sendis al Lerneja Konsilantaro manifeston: « Ke instruisto V., kvankam li forlasis katolikan eklesion kaj ne eniris alian, tute ne perdis nian konfidon; kontraùe ni aprobas ĉitiun agon de honesta viro kaj senzorge transdonas al li edukadon de niaj infanoj. » La ministro de Instruado estis atentigita pri la afero. Ni sciigos al nia legantaro la rezultaton. R. F.

Scanné avec CamScanner

# LA SOCIETO

*Libera Penso* estas jus enskribita en la *Internacia Federacio de la Libera Penso* kies sekretariejo estas en Brucelo.

## EN BARCELONO

Precizajn sciigojn del Kongresestraro pri niaj du seancoj, kaj de niaj Barcelonaj amikoj pri akcepto de *Libera Penso* ĉe la lokaj liberpensaj societoj, ni ne ricevis ankoraŭ. Fidu temen, ke ĉio estos kiel eble plej zorge preparita. La societanoj kiuj venos (plej multaj, en la nunaj cirkonstancoj, ankaŭ por kuraĝigi la aliajn esperantistojn), venu se eble iom antaŭ la kongreso kaj informu pri sia Bacelona adreso la sekretarion de L. P.

## TAGORDO DE LA ĜENERALA KUNVENO

**Raporto de la Komitato.** — Jen la teksto, kiun prezentos la sekretario.

« Karaj Societanoj, ĉar en oficiala Raporto oni devas nepre sin gratuli pro io, ni gratulu nin tial, ke ni vivas. De nia lasta kunveno, ni kreskis iom, sed malmulte, de 100 anoj ĝis 124. Nia loka grupo en Beaune (Françujo) daŭras kaj laŭ jusaj informoj de F-ino Rouff povos baldaŭ vigliĝi. En Parizo ni entreprenis kun S-ro Bourlet starigi urban grupon, kaj ricevis proponojn por helpo de du famaj liberpensuloj, S-ro G. Hubbard jam esperantisto, kaj S-ro Charbonnel : sed diversaj cirkonstancoj prokrastis ankoraŭ la fondon. De Lausanne S-ro Eydelnanth sendis ankaŭ promesojn. Kaj ni esperas ke en Hamburgo nia agema samideano S-ro Oscar Buenemann estos baldaŭ varbinta sufiĉe da novaj anoj por formi tiean grupon.

« Ni havas tri Honormembrojn, Forel, Pelant kaj Tolstoj, kaj nia brava amiko Francisko Ferrer el Barcelono, kiu volis esti simpla societano, ne pro tio malpli nin honorigas.

« Nia bulteno ĝis nun estas nia sola vivelmontro. Ĝi enhavas tro de francaĵoj, pro manko da aliaj komunikoj. Tamen ni publikigis 3 artikolojn el Bohemujo kaj unu el Anglujo, Germanujo, Moravio kaj Rusujo ; aperis ankaŭ personaj korespondaĵoj de S-ino Hueffmeier, S-roj Watters kaj Oscar Buenemann.

« Nia ekstera agado konsistis nur el sendo de artikoloj al francaj ĵurnaloj, inter kiuj kelkaj ilin presis, en monofereto por la monumento al Michel Servet, fine el nia enskribiĝo en la Internacian Liberpensan Federacion.

« Necesa konkludo de tiu tro mallonga raporto estos, ke ni devas nun plenkreski. Ni estas ĉitie serĉontaj la plej praktikajn rimedojn. Sed scias ja liberpensuloj, ke ne sufiĉas la decidoj del kunvenoj aŭ la bonvolo del komitatoj sen la persona agado de ĉiuj kunlaborantoj. »

Scanné avec CamScanner

**Kontoj de la Sekretario-kasisto.** — Oni facile sekvis sur la bulteno la kalkulojn. En tiu societa jaro (20 Aùgusto 1908–1 Sept. 1909) ni ricevis de la membroj, inter kiuj kelkaj aldonis ion al la regula kotizo, kaj de la abonintoj, sm 90.30; kun la resto del antaùa jaro 12.83, la enspezita sumo estas 103.13. Aliparte ni elspezis por la preso del bulteno 64.83, por papero kaj poŝtkostoj 37.92: sume 102.75.

Restas ja neniom (38 sd.) kaj ankoraù ni ŝuldas la preson de ĉitiu mem numero. Sed ni tuj enspezos kelkajn malfruajn kotizojn, kaj aliajn por la komencata jaro. Ree ni gratulu nin, ĉar ni vivis per niaj solaj rimedoj.

**Diversaj proponoj.** — *1e* De S-ro D-ro Batek: elekti du rezervajn komitatanojn por anstataùi la eksiĝontajn (Okt. 1908).

*2e* De S-ro Wolf: fondi garantian grupeton de 12 anoj por certigi regulan aperon de la bulteno; ĉiu el ili garantiu la elspezon necesan por unu numero (proksimume 8 sm jare), kaj pagu tiun sumon en specialan kason; el tiu kaso la deficito estu pagata ciujare, kaj la anoj repagu la 12an parton de tiu deficito (Aùg. 1909).

(Alia propono de S-ro Wolf pri elekto de ĉiunacia korespondanto estas jam alprenita en Dresdeno).

*3e* De S-ro Oscar Buenemann, kaj Elisabeth Hueffmeier: ke ni laboru laù iomete pli difinita programo, kvankam oni tion povus eble opinii kontraùa je la dua paragrafo de nia regularo. Certe ĉiu, kiu aùdas pri liberpensuloj, komprenas tion tiel, ke la aludata persono laù religia vidpunkto forpuŝas ĉion metefizikan prenante kiel bazon de siaj esploroj al ĉiuj demandoj kaj de sia edukado al la nova generacio nur la rezultaĵojn de la vera sperto persona aù scienca kaj rifuzante ankaù ĉiun hipnotisman sugestadon al niaj cerboj (pompo de l' preĝejoj kc) dum la esplorado al iuj problemoj. Laù politika vidpunkto oni ĝenerale ja komprenas la vorton laù la senco, ke liberpensulo ne konsideras, ke iu institucio havas la rajton bari la liberan vojon de l' pensado. Eble oni povus redakti flugfoliojn kiuj estus sendotaj al la sekretarioj de l' diversaj landoj aù urboj, kaj la sekretarioj dissendos aù disdonos ilin kie eble plej grandnombre ne nur por altiri novajn anojn, sed ankaù por veki intereson kaj helpon por nia movado ĉe personoj, kiuj nek estas nek fariĝas anoj. Tiom, kiom la leĝoj de l' landoj allasas tion, ni povus eble eldoni alvokon instigantan la personojn eksiĝi el la eklezio (en la hamburga respubliko la eksiĝo estas tre facila, kaj oni povas eviti al la infanoj la religiinstruon en la lernejoj; en Prusujo, kvankam iomete pli komplikata, la eksiĝo estas preskaù same facila, sed oni ne povas forteni la infanojn de la religiinstruo en la lernejoj). Tiam nia agado havus praktikan valoron forprenante de l' pensmalliberigaj institucioj iom da teritorio.

*4e* Interesaj por diskuti estos ankaù la deziroj esprimitaj de S-ro Watters (N° 3, Okt. 1908) pri agado de la societo por morala senteologia edukado.

*5e* La aliaj proponoj skribe alsendotaj aù buŝe prezentotaj.

**Tempo kaj loko del Ĝenerala kunveno 1910.** — S-ro Wolf proponas, se la 6a Kongreso de Esperanto okazos en Usono, ke la Ĝenerala Kunveno de nia Societo okazu en 1910 en Bruselo, samtempe kiel la Internacia Kongreso de Liberpensuloj.

**Elekto de du Komitatanoj.** — Laŭ la Regularo, la Centra Komitato renoviĝas po unu triono ĉiujare. Ne estas nun necese loti la nomon de la du eksiĝontaj, ĉar memvole eksiĝis unue S-ino Hankel jam post la Dresdena Kongreso, due S-ro Engst, kiu ĵus informas nin pri sia decido, kies motivo estas manko de tempo.

La du eksiĝintaj estas germanoj. Jen la nombro de membroj el la diversaj landoj : Francujo 48 (loka grupo en Beaune 10); Germanujo 16; Bohemujo kun Moravio 11; Svisujo 10; Anglujo 9; Hispanujo 5; Aŭstrio 4; Rusujo 4; Bulgarujo 2; Finnlando 2; Grekujo 2; Galicio 2; Argentino 1; Brazilujo 1; Hungarujo 1; Danujo 1; Holando 1; Italujo 1; Norvegujo 1.

Estas reprezentataj en la Komitato Svisujo (Sro Wolf, prezidanto, kiu laŭ svisa principo, ne volas resti prezidanto), Francujo (S-ro Deshays sekretario-kasisto), Anglujo (F-ino Fryer), Bohemujo (D-ro Batek).

LA VOĈDONO PER LETERO ESTAS PERMESATA. — Andresu la bileton al la sekretario, S-ro Deshays, Kongreso de Esperanto, Barcelono, antaŭ la 5a de Septembro.

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Karel KLAŜKA, studento de Pedagogia Instituto, SOBESLAV, Bohemujo.

S-ro Zohumil KLAŜKA, studento, KARD. REĈICE, Bohemujo.

Entute : 124 membroj.

**Abonoj.** — S-ro D-ro Fr. UHLMANN, HUTTWIL, Svisujo.

## KASO. — Aŭgusto

| | | | |
|---|---|---|---|
| *Enspezoj :* | Transportite | sm | 13.44 |
| | Kotizo de Korpelainen | | 1.94 |
| | Kotizo 1909-1910 de O. Buenemann | | 1.05 |
| | — — F-ino Hueffmeier | | 1.05 |
| | Abonoj de Fiŝer kaj Neupokojev (per librejo Warnier) | | 1.78 |
| | SUME | | 19.26 |
| *Elspezoj :* | Sendo del Julia bulteno | sm | 4.28 |
| | Poŝtmarkoj | | 0.79 |
| | Kovertoj | | 0.99 |
| | Preso del Aŭgusta bulteno | | 8.50 |
| | Sendo del Aŭgusta bulteno | | 4.32 |
| | SUME | | 18.88 |

Restas en kaso : 0.38.

*Sekretario-kasisto :* R. DESHAYS, Sens (Yonne), *Francujo.*

PROPAGATION DU LIVRE MARQUE SYNDICALE

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

sens

# BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

## Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910. — Nº 1. Septembro

## POR TOLSTOY KAJ POR FERRER

Ĉe la du ekstremoj de Eùropo ekzistas hodiaù du landoj, en kiuj la libereco de la penso, kaj sekve ĉiuj liberecoj, estas premegataj kaj kruele kondamnataj. En Rusujo, nia glora Honormembro, LEV TOLSTOY, estas nun persekutata : ne kuraĝante aresti respektatan maljunulon, la Cara registaro forkaptis kaj ekzilis lian tro fidelan sekretarion kaj amikon. En Hispanujo, profitante la ribelon de l' laborista popolo kontraù la maroka militiro, la klerika kaj reakcia potenco fermis ĉiujn laikajn lernejojn, kaj postulas la kapon de nia plej agema ano, Francisko FERRER.

Nu estas la devo de la INTERNACIA ESPERANTISTA SOCIETO "LIBERA PENSO", kies utilecon kaj baldaùan disvatiĝon tiuj ambaù apostoloj jam de l' komenco komprenis, protesti kontraù agoj, kiuj ne taùgas haltigi la progreson de l' ideoj, sed sukcesas nur inciti la koleron de l' popoloj kaj la honton de l' pensuloj.

Ne povante, pro momentaj malfacilaĵoj, ĝustatempe organizi efiikan agadon. ni petas niajn ĉiulandajn societanojn persone subteni per aliĝo, per monero, per obstinaj klopodoj, la movadon de universa indigno jam sufiĉe minacan por cedigi la tiranecon.

Por la Komitato de Defendo de l'viktimoj de l' hispana reakcio, sin turni al la Ĝenerala Sekretario, Sº Charles Albert, 15, rue du Parc Montsouris, Paris.

Sens

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910. — N° 1. Septembro

## POR TOLSTOY KAJ POR FERRER

Ĉe la du ekstremoj de Eŭropo ekzistas hodiaŭ du landoj, en kiuj la libereco de la penso, kaj sekve ĉiuj liberecoj, estas premegataj kaj kruele kondamnataj. En Rusujo, nia glora Honormembro, LEV TOLSTOY, estas nun persekutata: ne kuraĝante aresti respektatan maljunulon, la Cara registaro forkaptis kaj ekzilis lian tro fidelan sekretarion kaj amikon. En Hispanujo, profitante la ribelon de l' laborista popolo kontraŭ la maroka militiro, la klerika kaj reakcia potenco fermis ĉiujn laikajn lernejojn, kaj postulas la kapon de nia plej agema ano, Francisko FERRER.

Nu estas la devo de la INTERNACIA ESPERANTISTA SOCIETO "LIBERA PENSO", kies utilecon kaj baldaŭan disvatiĝon tiuj ambaŭ apostoloj jam de l' komenco komprenis, protesti kontraŭ agoj, kiuj ne taŭgas haltigi la progreson de l' ideoj, sed sukcesas nur inciti la koleron de l' popoloj kaj la honton de l' pensuloj.

Ne povante, pro momentaj malfacilaĵoj, ĝustatempe organizi efikan agadon, ni petas niajn ĉiulandajn societanojn persone subteni per aliĝo, per monero, per obstinaj klopodoj, la movadon de universa indigno jam sufiĉe minacan por cedigi la tiranecon.

Por la Komitato de Defendo de l'viktimoj de l' hispana reakcio, sin turni al la Ĝenerala Sekretario, S° Charles Albert, 15, rue du Parc Montsouris, Paris.

Scanné avec CamScanner

# Religio de l'Estonto

De ANTONIN SOVA

Tiu tempo nin naskigis, kiam ombro mezepoka
Sur homaro peze kuŝas altrudante sklavan ĝenon.
Hereditaj superstiĉoj kaj kutimoj mallumigas;
Sola devo ŝajnas inda : preni mensogantan maskon.

Malhumilaj ĉefpreĝejoj, miro de antikvaj urboj,
Estras kiel en estinto, arkojn alten ellevante.
Povo marŝas tra la placo rakontante pri Fiero,
Nun ankoraŭ ĝi aĉetas ĉarmon, homojn nudigante.

Movo de necerta gajno kaj mizero ĉiutage
Bolas en foirejego, ĝi katenas nin, rampaĵojn ;
Dume maltrankvila sprito venteganta en altecoj
Penas venki malhelpaĵojn, naĝi en profundegaĵojn.

Tamen, se ni akre vidis, se ni uzis ĝustan vorton,
Ni jam povis trovi fratojn, decidintajn kune iri ;
Ni eĉ povis vidi sunon bonfareme radiantan,
Arogantan kanajlaron vidi pro tagiĝo miri :

Sang, homaron ne sanigos, dio estas surda vorto,
Nur humana religio ligu bordojn de l' abismoj ;
Per ĝi servutulo lernu el katenoj sin eligi ;
Brakon de libera viro fortikigu virinamo.

*El bohema lingvo Tradukis*
RUDOLF FRIDRICH.

# LA SOCIETO

Pro diversaj malfacilaĵoj, la Ĝenerala Kunveno de LIBERA PENSO ne okazis dum la Kongreso en Barcelono. Laŭ decido de la Prezidanto, la voĉdonado estos farata perletere dum dumonata periodo. Nia precipa tasko por la komencanta jaro estos klopodi por alpreno de Esperanto kiel oficiala lingvo de la Internacia Federacio de Libera Penso. De nun la Societanoj devas do pripensi pri vojaĝo al Bruselo kaj partopreno ne

nur en nia Ĝenerala Kunveno, sed en la Internacia Kongreso de Liberpensuloj por subteni la proponon, kiun espereble ni sukcesos enskribiĝi en la tagordon per la naciaj federacioj. Aliparte la Internacia Ekspozicio altiros Bruselon multe da esperantistoj : tiel estos plej favora okazo por nia duobla propagando.

*Ni ricevis* kaj rekomendas kiel liberpensan plej interesan verkon la broŝuron de S-ro Bruijn (170 Kepplersraat, HAGO, Nederlando). *Naŭ historioj pri l'Aŭtoritato, laŭ Multatuli.* Prezo : 4 sd.

---

# NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Eugène PRIOU, 36, Grande Rue, SENS, Francujo.
S-ro DEMOULIN, employé au Chemin de fer, BEAUNE, Francujo.
S-ro Tercavin GUARRO, str. S. Lorenzo, 89, SABADELL, Hispanujo.

Entute : 127 membroj.

**ABONO.** — S-ro Louis A. ORSATTI, 1536 Sansom str., PHILADELPHIA Pa., Usono.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

ĈI-TIUN VOĈDONILON DETRANĈU, PLENIGU, kaj SENDU

*antaŭ la Ia de Decembro al la Sekretario*

*Revidu la detalon de l' proponoj sur la lasta numero*

| | |
|---|---|
| Raporto de la Komitato : *aprobate* aŭ *malaprobate* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | |
| Kontoj de la Sekretario-kasisto . . . . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri rezervaj komitatanoj . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri garantia grupeto . . . . . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri disdono de flugfolioj . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri agado por senteologia edukado . . | |
| Propono (nova, de S<sup></sup>e Deshays) por alpreno de | |

## KASO. — Septembro

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| *Enspezoj :* | Reportite | | sm | 0.38 |
| | Kotizo 1908-1909 de | Nuidant | | 0.99 |
| | — | Menneveau | | 0.99 |
| | — | Coppenet | | 0.99 |
| | — | Fromageot | | 0.99 |
| | — 1909-1910 | Desmoulin | | 0.99 |
| | — | Fryer | | 1.»» |
| | — | Uitterdyk | | 1.19 |
| | | Sume | | 7.52 |
| *Elspezoj :* | Poŝtmarkoj | | sm | 1.»» |
| | Leterpapero | | | 0.12 |
| | | Sume | | 1.12 |

Restas en kaso : 6.40.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo.*

*Jarkotizo, kun la monata bulteno, 1 sm. (Fr. 2.50)*

la francaj famuloj Anatole France kaj Ferdinand Buisson kiel Honormembroj ..........

Tempo kaj loko de nia Ĝenerala Kunveno 1909-1910 : propono por koincido kun la Internacia Kongreso de Liberpenso en Bruselo ..................................

Elekto de du Komitatanoj kaj, se plaĉas, de du rezervaj. Estas proponitaj ĝis nun S-roj Oscar Buenemann (German.), Fridrich (Morav.), Guillemin (Franc.), kaj S-ino Hueffmeier (German.). F-ino Rouff (Franc.) proponita deklaris, ke ŝi ne povus akcepti ............

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

Scanné avec CamScanner

BULTENO

DE

Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 3. Novembro

# LIBERA PENSO

Rigardante la ĝeneralan vivadon de l'homoj, iliajn ideojn pri bono kaj malbono, la motivojn de ilia respekto kaj timo kaj konsiderante aliflanke la ĝeneralajn ideojn kaj dogmojn, kiujn precipe la ekleziaj, sed ankaŭ la ŝtataj instruaj institucioj celadas doni al la homoj, ni ekvidas grandan malakordon.

La nuntempa rolo de l'eklezio kaj de l'pensmalliberigaj ŝtataj institucioj estas nur, subteni tradiciajn instituciojn, kiuj gajnigas monon al personoj ne laborantaj por ĝia akiro aŭ ne alcelantaj per sia agado la altajn celojn, kiujn oni supozas al ili kaj kiuj donas gloron kaj privilegiojn al personoj, kiuj tion neniel meritas.

Por certigi al si tiun ĉi potencan pozicion, la eklezio havas la plej grandan intereson, konservigi malgraŭ la evidentaj rezultaĵoj de la scienco la superstiĉon, la rekompencteorion pri postmorta vivo, la malklerecon, la tradiciemon kaj la sekonscian vivadon, kaj akordiĝante kun la registaroj, ĝi alcelas fari el la homo facile regeblan, kredeman, aŭtoritatadoreman kaj humilan regnanon.

Por atingo al tiu celo la sugestado estas la plej efika kaj plej uzata rimedo. Ĝin uzas la EKLEZIO, kaptante la infanojn de la plej frua aĝo per sugesta religia instruo, altrudante al ili la rekompencteorion, kiu igas ilin juĝi siajn agojn laŭ puno kaj rekompenco atendata, per religiaj senĉese ripetadataj kantoj kaj limigante la naturscienean instruon, poste enmiksante sin en la privatan vivon de l'homoj

Scanné avec CamScanner

je ĉiuj gravaj vivokazoj kaj daŭre efikante sur la homon per la hipnotismo de l'preĝeja pompo kaj muziko.

La ŜTATO, glorigante dum la instruo al la infanoj ĉiujn kruelajojn kaj buĉadojn de l'pasinta tempo, donante nimbon al ĉiu tronposedanto, kaj posedinto, venenigante la infanojn per patriotaj kantoj kaj enspirante al la homoj militeman spiriton, kiu igas ilin blindaj kontraŭ la plej grandaj hontindaĵo de nia kulturo : la milito.

Samtempe tiuj institucioj (ekleziaj kaj ŝtataj) asertas, ke ili donas la bazon de ĉiu moralo. Sed kia tiu moralo povas esti, se ĝi dependas de la privataj monaj interesoj de certaj kastoj, kiuj certigas al si daŭran despotismon ? Ni vidas la rezultaĵojn : la pligrandigon al la diferencoj, inter la valorigo al ĉiu homo, la ekspluatadon al multaj de kelkaj, la profitavidegan konkurencon, inter la komercistoj, la prostitucion, la limigon al la libera opiniesprimo kaj la inklinon de l'homoj, humile servi kaj riverenci pro mono.

Moralo povas esti bona nur, se ĝi estas sincera ; ĝi estas sincera nur, se ĝi bazas sin sur la natura instinkto de l'homo : «egoismo» edukita tiamaniere, ke ĝi ne toleru maljuston aŭ malbonon, sed celu ĉiam nur harmonion, bonfarton por ĉiuj. La homo devos konscie senti, ke ĝi ne povas farti bone, se ĉirkaŭ ĝi regadas maljusto, senklereco, malsano, kaj ĝia egoismo mem devas postuli pli bonan staton. Tamen tiu pli alta vidpunkto de l'homoj pri la respondemo kontraŭ la socio ne povas esti atingata tiom longe, kiom regas tiaj ekonomiaj statoj, kiaj ili estas nune: tio estas, tiom longe, kiom la posedaĵo — plejgrandparte en la formo de l'mono — estas la centro de l'vivo. Nur kiam la aparta posedaĵo ne havos plu la nunan valoron, la homoj povos esti pli sinceraj unu kontraŭ la alia kaj kontraŭ la granda socio.

Ni do vidas, ke tiuj ŝtataj kaj ekleziaj institucioj ne estas akordigeblaj kun vera kulturo ripozanta sur scienco kaj celanta individuan bonfarton por ĉiu homo. Pro tio nia unua celo devas esti la *Apartigo al la Eklezio kaj la Ŝtato*. Ni povas atingi tiun celon nur per tio, ke ni, liberpensuloj, tute fervore instigas la personojn al la eksiĝo el la eklezio (precipe la virinojn, edukontajn ja grandparte la novan generacion); ĉar nur tiam la eklezio perdos sian nunan potencan pozicion, se la nombro de ĝiaj anoj plimalgrandiĝos.

Plue ni devas protekti la novan generacion, kies moralaj leĝoj — kiel ni tre intense esperas — havos tute sanan kaj naturan bazon, kontraŭ la influo de l'eklezio (kiom

eble ankaŭ de l'registaro) kaj ĝiaj sugestoj kaj, kie la leĝo permesas tion, liberigi la infanojn de tiu edukado.

Individue ni pensu kaj agu, ne ĉiam nur sekvante la publikan opinion, mem ne esplorante la gravajn vivdemandojn. Ni estu memkonsciaj kaj ne falu en la tenton, lasi nin influi per kaj de sugestoj. Ne hipnotismaj imagoj, enusgestitaj opinioj kaj laŭtradiciaj kutimoj regu niajn intencojn, nian pensadon, nian agadon, sed nur faktoj pruvitaj per la propra sperto aŭ pripenso kaj per la scienco. Neniun aŭtoritaton ni adoru : nek rangan, nek tradician. Kontraŭ la tradicio ni devas batali ankoraŭ eĉ en la medio de l'liberpensuloj; ĉar ne ĉiuj, kiuj liberiĝis el la eklezia influo, jam povis liberiĝi el la kutimoj, antaŭjuĝoj kaj eĉ dogmoj de la tradicio, ĉu en la privata, ĉu en la publika vivo. Bedaŭrinde la tradiciaj valoroj plaĉas ankoraŭ tre multe al la oportunemo de l'homoj. Pro tio ni instigu la personojn, ne tiom time konservi la morojn de l'prapatroj: ĝenerale nenio el la «bona antaŭa tempo» estas imitinda.

Jen niaj celoj. Tiajn vastajn kaj tamen tiom urĝe realigindajn celojn ni povas atingi nur per internacia organizacio kaj per individua praktika agitado de ĉiu ano.

E. HUFFMEIER kaj O. BUNEMANN.

## LA SOCIETO

**El la loka Grupo en Beaune (Francujo).** — La Beaunera Grupo de «Libera Penso» protestas energie kontraŭ l'asasino de Ferrer. Ĝi esperas, ke monumento baldaŭ staros al la gloro de l'suferinto de la klerika malamego. Ĝi kolektis por tio la sumon da 16 fr.

— Tute imitinda aperas la iniciato de niaj sameclanoj en Beaune, precipe post la malnoblaj kalumnioj per kiuj la mortigintoj penis malpurigi la memoron de l'viktimo. Aliparte la sekretario de «Libera Penso» alpreniĝis kiel ano de l'komitato starigita de la franca Ligo por la defendo de la Rajtoj de l'Homo je la celo dediĉi monumenton al Ferrer sur placo en Parizo : li transdonos al tiu komitato la monon kolektotan de la societanoj.

**El Parizo.** — La kongreso de la nacia Asocio de l'francaj Liberpensuloj, en kiu partoprenis kelkaj anoj niaj, unuvoĉe esprimis la deziron, ke la Internacia Kongreso en Bruselo (1910) akceptu **Esperanton** kiel oficialan organon de la universala Liberpensularo, speciale en la kongresoj.

Scanné avec CamScanner

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Frans SCHOOFS, 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen, Belgujo.
S-ro Emilo GASSE, 55, rue Fr. Bellanger, Le Havre, Francujo.
S-ro Fr. RITZ, fervoja direktoro, Huttwil, Svisujo.
S-ro E. MATHIEU, Montbard, Francujo.
S-ro Paul RENARD, rue d'Abrantes, Montbard, Francujo.
Entute : 133 membroj.

## *KASO. — Novembro*

Por pli plena ĝusteco la kalkuloj estos nun esprimataj per frankoj, kiel ili necese estas farataj ; nur la sumoj prezentiĝos per spesmiloj.

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite (8,85 ₷) | Fr. 22.35 |
| | Anonima donaco | 20.»» |
| | Kotizo de Dauphin | 2.50 |
| | — Humberset | 2.50 |
| | — Schoofs | 2.40 |
| | — Gasse | 2.50 |
| | — H. Meyer | 2.65 |
| | — Mathieu | 2.50 |
| | — Renard | 2.50 |
| | — Kluge (1908-9 kaj 1909-1910) | 4.90 |
| | — Blangarin — | 5.»» |
| Vendo de broŝuroj Pledo por Ferrer | | 56.45 |
| | SUME | 126.25 |
| *Elspezoj* : | Poŝtmarkoj | 3.»» |
| | Kovertoj | 3.20 |
| | Sendo de l'Oktobra bultenoj, kun broŝuro al gazetoj | 12.10 |
| | Saldo al la presisto en Sens (2 n-roj de l'bulteno) | 43.»» |
| | Transportoj kaj sendoj de broŝuroj Pledo por Ferrer | 17.60 |
| | SUME | 78.90 |

Restas en kaso : 47.35.

**Ŝuldoj.**— Al esp. presejo en Chalon-sur-Saône (Francujo)

| | |
|---|---|
| 1e 4733 broŝuroj | 260.30 |
| 2e Oktobra bulteno (500) | 19 » |

**Deponite ĉe jurnaloj kaj vendistoj : 2645 broŝuroj.**

---

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*

*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

Scanné avec CamScanner

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 4. Decembro

# LA LIBERPENSAJ INSTRUISTOJ

## en AŬSTRIO kaj FRANCUJO

### 1e. — El letero de morava instruistino.

En nia lando Moravio estas nun tre malbonaj rilatoj. Precipe la lernejoj kaj la instruado trovas sin en danĝero esti tute okupitaj de klerikuloj. Instruisto, kiu kuraĝas eliĝi el katolika eklezio, devas tuj forlasi sian profesion. Ĉiu pli libera esprimo de penso estas persekutata kun disciplinaj ekzamenadoj,

Kontraŭ tio batalas plimulto da geinstruistoj, kiuj estas asocitaj en granda instruista societo. Je tiu ĉi jaro estas ĉe nia instruista societo fondita speciala fako nomita « La Libera Lernejo », kies celo estas batalo kontraŭ reakciaj influoj.

Precipe mi volus sciiĝi, kiel la francaj instruistoj laboris por liberigi sin de tiuj influoj. Ĉu ili antaŭe propagandis inter si tiun ĉi penson, kaj poste per publikaj paroladoj inter ceteraj homoj?

Ĉe ni la regado kaj la influaj oficoj estas ankoraŭ en klerikaj servoj, kaj tial la kontraŭklerika laboro iras tiel malrapide. Tiuj, kiuj kontraŭbatalas, ne povas atingi tiel facile progreson kiel tiuj, kiuj estas en klerikaj servoj. Tial oni trovas plimulte da senkarakteraj homoj, kiuj kontraŭ sia konvinko estas tamen batalantoj en klerika partio.

Scanné avec CamScanner

Lasttempe mortpafis sin unu studento en instruista instituto, ĉar la klerika direktoro kaj ceteraj membroj de instruista korporacio ekzamenis tre severe kaj tute maljuste lian kamaradon pro kontraŭklerikaj vortoj, kiujn li tute ne diris. Tiu ĉi studento defendis sian kulunon ankaŭ ĉe katehisto. Tiu ĉi insultis lin maldelikate, instigis tutan instituton kaj lian familion kontraŭ li, kaj ĉar li tiel ne povis vivi, li mortpafis sin. Lia kamarado tute maljuste estis eksigita de instruista instituto. Tiel oni edukas estontajn instruistojn.

## 2e. — Respondo de l'sekretario de LIBERA PENSO

Estimata Kolegino,

Kun korprema intereso mi legis la detalojn kiujn vi donas al mi pri la situacio farita en Moravio al la liberpensaj instruistoj : tio nur tro konsentas kun la komunikoj de nia korespondanto aperintaj en nia bulteno de Aŭgusto 1909, montrantaj la hipokritan farmanieron de la aŭtoritatoj, kiuj en Bohemujo pretendis forigi la liberpensajn instruistojn kiel perdintajn pro disiĝo de l'eklezio la konfidon de l'gepatroj.

Kiel venki la subpremon? ne estas niaj konsiloj — konsiloj ja malprecizaj al unuiĝo kaj energio — eĉ ne estas nia ekzemplo de ni francoj, kiu taŭgos ĝin konigi al vi, tiel diferencaj estas la situacioj ! Tamen ne estos seninterese por vi, almenaŭ malrekte, kompreni kia estis en Francujo la politika rolo de l'instruistoj : ĉar tie estas la nodo de la demando.

Mi ne parolas al vi pri la duagrada instruado, kiun mi plibone konas ĉar mi partoprenas en ĝi : ĝi restis ĝis hodiaŭ, krom kelkaj bruaj esceptoj, sendependema sed timema, konscienca sed burĝema, sen efiko al la regno kaj sen influo en la lando.

Tute alia estis la karaktero kaj la sorto de la unuagrada instruisto. La antiklerikalismo estis por la respublika partio la viva punkto de l'programo kaj ĝi fariĝis por la radikala partio la granda regrimedo. Je 1881 la ministraro Jules Ferry fondante la unuagradan instruadon senpagan, laikan kaj devigan, enmetante en ĝin la moralon, igis Lernejo.., kontraŭ senigita Eklezio, la fortikaĵo de la moderna Regno : la instruisto anstataŭis la pastron ĉe la knabo kaj lin kontraŭbatalis ĉe la civitano, ĉe la elektanto : nomita de la prefekto (ministrejo de l'internaj aferoj), li estis la fidatulo de l'Respublika Registaro, kaj la agento de l'radikala kandidato.

Scanné avec CamScanner

Dank'al la instruistoj la radikala partio atingis la potencon kaj fine plenumiĝis la laboro de moderna racio, la Disigo de l'Eklezioj kaj de l'Regno.

Sed dum la venko donis al niaj bravaj batalantoj, kun tronecesa plialtigo de ilia materiala kaj morala situacio, nur pli da fido kaj fervoro je la demokrata progreso, ĝi koruptis la elektitojn: kaj per troaj postuladoj, personaj tiranajoj kaj evidentaj malfidelecoj, la interligo sanĝiĝis je netolerebla servuto.

Jen kial hodiaŭ la instruistoj, grupigitaj en siaj Amikaroj aŭ eĉ Sindikatoj, defendas sian sendependon kaj siajn ideojn ĉiam decide antaŭenemajn kontraŭ la eksprotektantoj forgesintaj siajn principojn, kaj kiuj, eĉ en la fina batalo de la liberigita Eklezio kontraŭ la laika Regno, nur malenergie subtenas la kulpigitajn instruantojn. La parlamento, dum la ĵusa semajno, rifuzis la amnestion al instruisto forpelita pro kulpo de opinio; prefekto, antaŭ kelkaj monatoj, oficiale demandis du sindikatistajn lernigistojn « kion ili estus voĉdonintaj » pri antimilitarista mocio prezentita en kongreso, kie ili ne partoprenis!

Pli kaj pli aperas, ke la batalo, en Francujo kiel ĉie, nun estas transportita sur la socian kampon : eĉ se ili malamas la pastraron, la burĝoj timas precipe socialismon; la amaso de l'instruistoj staras por la laboristoj kontraŭ la kapitaluloj : ili estas de nun suspektataj.

Kaj tie ja, kiel mi pensas, estas ankaŭ ĉe vi la fondo de la demando; sed tiu bloko de l'tradicioj kaj privilegioj, kiu penas ĉi tie por sin refari, restas ĉe vi ankoraŭ fortika. Ne do, kiel ŝajnas, per propra politika agado, sed per ĝenerala progreso kaj en komuna liberigo vi triumfos.

---

# LA SOCIETO

La skriban voĉdonon partoprenis nur 13 membroj. Ĉiuj proponoj estas aprobitaj de la plimulto, unuvoĉe tiuj pri rezervaj komitatanoj kaj disdono de flugfolioj, apenaŭ plimulte tiuj pri garantia financa grupeto kaj agado por senteologia eduko.

Estas elektitaj komitatanoj S-roj Oscar Buenemann (Germano) kaj Guillemin (Franco), rezervaj komitatanoj S-ro Fridrich (Moravo) kaj S-ino Elisabeth Hueffmeier (Germanino.)

La titolon **Honormembro** afable akceptis S-ro Ferdinand BUISSON, franca deputato, organizinto de la laika unuagrada instruado, fidela batalanto por la primitiva radikala programo kaj ĉiuj liberecoj.

Dank'al iniciato de nia kolego Schoofs kaj helpo de la societo « Juna liberala Gvarelio de Zurenborg » (*Antwerpen*, Belgujo), Libera Penso eldonas *flandran tekston de la Pledo por Ferrer* en broŝuro je Fr. 0,10. Profitojn duone dividus inter si la du societoj; malgajnon garantias mem S-ro Schoofs.

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Josa MAREŜ, ĝenerala sek. de Ĉiostudenta Asocio, banurbo LUHAĈOVICE, Aŭstrio-Moravio.
S-ro Ludovic RODO PISSARO, 14, rue Girardon, Paris, Francujo.
S-ro B.-F. SCHUBERT, Bureau of Pensions, WASHINGTON D.-C., Usono.
S-ino Ida S. KURTZ, 1505 North Capitol str., WASHINGTON D.-C., Usono.
S-ro J. MARIETTE, Cleguer (Morbihan), Francujo.
S-ro RICHARD P.-J., 11, rue du Midi, Hyères (Var) Francujo.
S-ro Johano VILARDELL, str. Poniente, 11, Sabadell, Hispanujo.
S-ro N. HRISTOSKOFF, str. I.-C. Bratianu 5, Bukureŝto, Rumanujo.
Entute 141 membroj.

## *KASO. — Decembro*

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | Fr. 47.35 |
| | Kotiso de Stroele | 2.40 |
| | — Rodo Pissaro | 2.50 |
| | — Ladevèze | 2.50 |
| | — Richard | 2.50 |
| | — Baudoin (parte) | 2.00 |
| | — Hristoskoff | 2.40 |
| Vendo de broŝuroj Pledo por Ferrer | | 17.45 |
| | SUME | 81.60 |
| *Elspezoj* : | Sendo de la Novembra bulteno | 11.25 |
| | Poŝtmarkoj | 2.00 |
| | Kovertoj | 1.95 |
| | Sendoj de broŝuroj | 1.55 |
| | SUME | 16.75 |

Restas en kaso : 64.85 = ₷ 25.68.

**Ŝuldoj.** — Konto de la presisto 26 Dec. Fr. 294.40.

**Deponite** ĉe ĵurnaloj kaj vendistoj 2730 broŝuroj.

**AVISO. — Pagu senprokraste la kotizon 1909-1910.** Anoncu, disvendu broŝurojn. Sendu kolektmonon por la monumento al Ferrer.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*
*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

Scanné avec CamScanner

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — Nº 6. Februaro

# La Mensogo de l'Almozo

*(Pri la Francaj superakvigoj)*

Patroninaj Moŝtoj, almozpetantaj Sinjorinoj de la alta mondo, ne, mi ne povas vin alsolvi; miksiĝas al via fervoro tro da memama vanteco, tro da bezono montriĝi, tro da koketeco. Vi parolas pri filantropeco kaj pensas nur pri la reklamo, pri la interrilatoj, pri la rimedoj okupi profite por via gloraĉo libertempojn al vi faritajn de privilegiaj situacioj. Ne laŭdebla estas via interveno sur la kampo de l'helpado, ĉar ĝi malaltigas la sentojn kaj falsas ĉiun ideon pri justo kaj maljusto.

« Denove unu tertremo », diris junulino pri la katastrofo ĉe Messina septembro 1908, kia feliĉo, oni jam povos dancadi! Jes, Fraŭlino, vi povos danci, kiam okazos pluaj malfeliĉegoj; viaj patrinoj organizos bonfarajn balojn, loteriojn per viaj malnovaj pupoj kaj la ornamaĉoj de viaj roboj; estos bufedoj kie vi dejoros kiel vendistinoj, kaj vi pasos de mano al mano, lasante kaj reprenante la brakon de la danculoj, dum tuta nokto da junaĝa senzorgeco. Kiom da sendormaj horoj tamen estos kostintaj viaj plej etaj puntaĵoj al aliaj tiomjaraj junulinoj, kaj kiom el ili, per tiaj laboradoj, fordifektis la okulojn!

Vi jus povis, Fraŭlino, peti vian patran Moŝton vin konduki al la Pariza Opero, aŭ al la Komikopero, aŭ al la

Franca Teatro, aŭ ankaŭ alien, ĉar oni ĉie organizis solenajn prezentadojn profite de la superakvitoj. Tiel, maksimumo de mizero ĉe la suferintoj de la ruinigaj akvoj estos respondita ĉe vi al maksimumo de l'ĝojo. Ho, mi ne volus vin malbeni, sed vere, el kia ŝlimo formiĝis via koro, el kia koto via cerbo? Ĉu vi puraj ne ruĝigas tiel riĉe ornamiĝi, kiam viaj malĝojaj fratinoj kaj iliaj infanetoj frostotremas, timoplenaj, sen tukoj, sen lito, sen tegiloj? Ĝis kiam estos necese, por ricevi de vi kaj de viaj familioj kelkajn monerojn por malfeliĉuloj, prezenti al vi distraĵojn kiuj kostas dekoblon, dudekoblon, centoblon de tio, kion gajnigos, post subtraho de l'elspezoj, la prezo de la eminenta loko, kiun vi estos okupinta? Ho, vi estas ja la degenerinta frukto de barbaraj civilizacioj!

Iom ni matematiku, mi petas. Kiam vi pagas centkvindek frankojn sesseĝan loĝion en Opero, por unu el tiuj ridindaj solenfestoj, kiuj estas arta kaj mora hontodaĵo, ĉu vi scias, ke restos ne multe pli ol dudekfranka monero al la profitontoj de la prezentado, dum cetero dispediĝos per mil lertaj aŭ burleskaj eltrovoj por pliigi vian ĝuon? Je tiuj kondiĉoj, kion vi estus respondinta, se oni estus dirinta al vi: «Spezu la tuton de la centkvindek frankoj, kiuj estas via superfluo, en nian helpan kason, kaj nenion retenu por viaj plezuroj. Ĉu estus nekapabla bonfari al malfeliĉo ne postulante ion interŝanĝe?»

Mi ne parolas nun persone, ankaŭ ne sentimentale; sed ĉe la terura realaĵo kiu nin subpremas, kontraŭ la vero kiu sin entrudas, estas ja necese ke mi tion diru, se oni estus al vi prezentinta tian inviton, vi estus rifuzinta doni vian monon. Ne protestu: se vi estus kapabla je tiel simpla memforgeso, de longe la kutimo de la bonfaraj festegoj estus malaperinta. Tiuj festoj, kio estas, se ne la skorioj de rafina kaj barbara civilizacio?

Ni pliprofundiĝu en vivaĵon de l'demando. Tiujn etajn sumojn, kiujn la riĉuloj rifuzus donaci sen kompenso, tiujn ili ŝuldus laŭ ĝustega justeco, kaj kune multajn aliajn pli grandajn. Ili ŝuldus ilin kiel elpagon pro nekalkuleblaj malprofitoj kiujn ili kaŭzis; ĉar se estas katastrofoj kiujn oni povas diri ekskluzive rezulto de la blindaj naturfortoj kontraŭ kiuj ni restas senarmaj, ekzistas aliaj nepre plimultaj kiujn ni taŭgos antaŭscii, kaj sekve kiujn la individuoj aŭ la registaroj, sub sia respondeco, devas malokazigi aŭ bari.

La grandega kresko de l'rivero Seine (Sen), kies terurajn efikojn ni ĵus suferis, estus estinta nek tiel violenta nek

tiel subita, se, de jarcentoj, vastegaj arbaroj ne estus detruitaj. ..u por la profito de l'humilaj kamparanoj aŭ de l'premegataj proletarioj permesiĝis kaj brute fariĝis tiuj hekatomboj de belegaj arboj? Ĉu plivere ne estus tial ke la posedantoj de tiuj miloj da arbaraj hektaroj volis tuj al si aljuĝi la longatempan produkton de l'internaj sukoj de la tero, kaj monigi dum kelkaj jaroj arbojn kiuj de plej antaŭaj memoroj estis, por la lando, sanigo, sendaĝerigo, freŝigado, unuvorte ornamo neesprimeble bela, utila kaj majesta.

Kiu havis la precizan devon malhelpi la senarbigojn? La registaroj kiuj personigas je ĉiuj epokoj la tiel nomitajn direktantajn klasojn, tio estas la riĉecan aristokrataron, la financan nobelaron. Sed la registaroj konsistas el posedantoj, ili faras leĝojn favore de l'posedantoj, ili havas fetiĉismon por la posedo, kvazaŭ la tero ne apartenus al ĉiuj.

La malgranda Svisujo, kiu ŝajnas rideti je siaj diafanaj lagoj, je ĉiu el siaj kaskadoj, donas al ni ekzemplon de saĝa antaŭzorgo. Arbara regularo devigas la loĝantojn neniam forhaki arbon ne tuj plantante alian por ĝin anstataŭi. Se oni volus fari en Parizo kvaronon de la defendkonstruoj efektivigitaj, ĉe la fluo de Aar kaj Rhein, de la svisa registaro, neniam plu estus timindaj enpenetroj aŭ ekokupoj de la akvoj.

Ni devas publikigi protektajn leĝojn kontraŭ la kapitaluloj kiuj riĉiĝis detruante niajn arbaregojn perde de l'tuta nacio, kaj kiuj sin kredas kvitaj kaj sensuldaj kontraŭ siaj fratoj kiam ili pagis, por sia plezuro, iom pli ol laŭ la kutima tarifo, kaj tiel donacis panpeceton al la suferintoj, siaj viktimoj.

El la franca ĵurnalo «La République syndicale».

---

*El privata letero de germana verkisto citita en la franca gazeto «La Grande Revue».*

Pri mia nova dramo mi ankoraŭ nenion povas diri precize. Tio dependas nek de ni, nek de la direktoroj, sed de la polico: ĉi-tiu ne jam permesis ĝin, kaj trovas plezuron ĉiumaniere ĉikanante kaj retenante dum semajnoj teatrajon, al kiu ĝi pretendas havi kontraŭdirojn.

Berlino fariĝas ĉiutage pli «rusa» kaj ni marŝus tie ĉi rapidire al la nuligo de ĉia penslibereco, al la forgeso de ĉiuj garantiitaj rajtoj. Se nia registaro, konsente kun la imperiestro kaj la nobeleta partio daŭrigas manovri kiel ĝi nun faras, estos baldaŭ revolucio.

## LA SOCIETO

EL LA REGULARO : Ĉiu kotizo ne pagita dum la unua jarkvarono (Sept.-Dec.) estas enspezata per la poŝto, kaj la prokrastinto devas pagi la poŝtajn kostojn.

La Kongreso de la INTERNACIA FEDERACIO DE LIBERA PENSO okazos en Bruselo *21-24 Aŭgusto 1910;* ni baldaŭ fiksos, je la sama tempo, la daton de nia Ĝenerala Kunveno en Bruselo, kie okazos ankaŭ Universala Eksposicio kun grava parto Esperantista. De nun prepariĝu!

Transdoniĝis al la Komitato de la Ligo por la Rajtoj de l'Homo la mono kolektita ĉe nia Grupo en Beaune. Fr. 19.50 (₷ 7.80).

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro F.-J. SANDECKI, U. E. A. delegito, str. Ujazdowska, 6, Varsovio, Polujo-Rusujo.
S-ro J.-H. VICH, P. O. box 184, Cleveland, Ohio, Usono.
S-ro Fr. RAMBOUSEK, Slerzsa 14, Kral. Vinohrady, Bohemujo.
FABRIKO « GLOBUS », Prestejov, Moravio.
Eksiĝis D-ro Rapine, S-ro Castoldi, S-ro kaj S-ino Schwengeler-Dunner.
Entute : 147 membroj.

### *KASO.*

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | Fr. 95.05 |
| | Kotizo de Sandecki | 2.40 |
| | — Rambousek | 2.50 |
| | — Matuszewski | 2.80 |
| | — Ferencowicz | 2.50 |
| | — Fabriko « Globus » | 2.40 |
| | — Engst | 2.50 |
| | — Guillemin | 2.50 |
| | Vendo de unu N° | 0.25 |
| | Kolekto de Guillemin | 0.65 |
| | SUME | 113.55 |
| *Elspezoj* : | Sendo de l'Januara bulteno | 10.70 |
| | Kovertoj | 1.40 |
| | SUME | 12.10 |

Restas en kaso, Fr. : 101.45 = ₷ 40.01.
Ŝuldoj al presisto 294 kaj 18.10 kaj 18.10 = 330.60 (₷ 130.89).
Kontoj de la broŝuroj en la sekvanta N°.
*Korektote :* Forgesiĝis inter la ricevitaj kotizoj la nomo de S-ro Grimm sur la Decembra bulteno; tamen la sumo estis ĝuste presita.

---

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*
*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 5. Januaro

## KONTRAŬ LA MILITO (M. Engelgardt)

Kiam iu malfeliĉa homo, pro spirita malkleraĵo aŭ ia tempa (persona) malbonfaritaĵo, faras al iu cetere grandan krimon, tiam ĉiuj indignas kontraŭ li kaj eĉ estas pretaj lin disŝirigi je pecetoj. Sed tiaj mortigistoj, kiel Napoleono, kiuj dum sia tuta vivo sin okupas je mortigado de homoj estas glorigataj de tiuj samaj homoj, kiuj indignas kontraŭ la bedaŭrinda krimulo...

Sed ĉiam ŝajne la homaro iĝas pli prudenta kaj nobla iom post iom. Kaj tio jam estas sukceso, la homoj penantaj senkovrigi la malmoralajn ideojn en la luksa uniformo de la belŝajnaj malkonsciaĵoj. Do, en sia, animoj la homoj hontas, kaj tio jam estas bona antaŭsigno. La unuatempaj kruelbestoj — la regimentestroj kaj iliaj kunuloj ne hontis. La egiptaj faraonoj post ruinigo de tutaj landoj, estas eternigintaj siajn kruelaĵojn per piramidoj kaj sfinksoj kiujn oni ornamadis per bildoj, reprezentantaj veturilojn plenigitajn per dehakitaj manoj kaj piedoj; kun surskriboj, per kiuj tute malkaŝe oni diradis : « Mi egipta reĝo, pereigis tiom kaj tiom da homoj, la maljunulojn mi ne ekkompatis, la infanojn mi ne ekbedaŭris, la urbojn mi forbruligis, la kampojn mi elĉiifis, miru vi miajn faritaĵojn, postularo! » (1).

Nun neniu sin laŭdas per tiaj faritaĵoj kaj neniu sin gloriĝas per ili. Pri ili oni silentas. Neniu volas diri : Napoleono estas eminenta, ĉar li pereigis du milionojn da homoj,

---

1. Tiajn bildojn kaj surskribojn oni estas konservintaj sur la unuatempaj egiptaj kaj asiriaj monumentoj.

li elverŝigis dek milionojn da k. gr. da homa sango, li ruinigis kaj dezertigis tiajn kaj tiajn regionojn. Tiajn faritaĵojn oni eĉ ne ripetas, kvazaŭ ili eĉ ne ekzistus. Li ne mortigis, ne ruinigis, li «glorigis, superigis, disportadis famon» k.c., k. c. Pli frue oni diradis : eminenta estas, ĉar li mortigadis..., nun oni diras : eminenta estas **malgraŭ tio**, ke li mortigadis. Pli frue en la sama mortigo oni vidadis bravaĵon, nun la mortigon oni abomenas, kaj nur penas ĝin pravigi iel. Sed kiam oni povas havigi al si neniajn motivojn per kiuj pravigi ĝin, krom malplenaj babilaĵoj kaj kalumnioj, do, ĝi pruvas, ke la militistara afero jam subfalas. Ne hodiaŭ, tiam morgaŭ la malkonsciaĵo kaj frenezaĵo de tiaj pravigaĵoj fariĝos videblaj ankaŭ por la plej malkleraj kaj trivialaj homoj.

Kiel oni elrigardas laŭ ĉio, Eŭropo estas en la antaŭvesperiĝo de unu tia trabriligo. La movado kontraŭ la milito kaj militarismo, kaj por la utilo de la paco kaj senarmiligo, la forrifuzoj de militservo (1) de la flanko de individuaj personoj aŭ grupoj da homoj, — ĉio ĉi alprenas lasttempe tian larĝan horizonton, aliogas tiom da multaj aliĝantoj kaj predikantoj, ke la defendantoj de la «glavo kaj sango» komencas kvazaŭ ŝajne timi, por ke oni vere ne naskigu ion neatenditan de tio. Kompreneble laŭ tiuj homoj la ideo por la eterna paco restas, same kiel antaŭe, la vana fablo, « utopio » sed ili scias tre bone, ke tio, kio hodiaŭ ekzistas, estis hieraŭ utopio, kaj la hodiaŭa utopio povas morgaŭ efektiviĝi. Saman kaj nome tian karakteron ekkomencas alpreni la utopio por la eterna paco : ĝi ankoraŭ ne estas enkorpigita en la vivo, sed ĝi jam estas enpenetriginta sufiĉe profundajn radikojn en la homa vivo.

Eltirita el la revuo « Vazraĵdane » (Renask.) El bulg. lingvo, Nikif. Hristoskoff.

---

# PENSOJ

Pensoj de Ernest RENAN, ĵus retrovitaj en plano de nefinita romano.

Mi kredas je la faro de l'modernaj tempoj. Tio ĉi eĉ estas eble mia plej bona kreddeklaro, la plej ĝusta, tiu al kiu mi min reportas plej ofte.

---

1. En Bulgarujo, dank'al la tieaj kuraĝaj samcelanoj, jam okazas tre oftaj forrifuzoj por militservo ĉia ajn. (Rimarko de l'tradukinto).

— La vivo estas tro mallonga. Ni bezonus unu vivon por ami, unu vivon por scii, unu vivon por bone agi : ho ve! kaj se oni volas ami oni devas preskaŭ forlasi scion, kaj se oni volas scii, oni devas preskaŭ forlasi amon. Tio estas krudela.

— La senmorteco de l'animo fariĝis plifunesta ol utila al la progreso de l'homaro. Ĉar, antaŭmetinte la senmortecon, ne plu estas tiel peninda klopodi por restarigi la justecon en tiu-ĉi vivo : tio fariĝas tie alte. Tiam la malindulgaj kaj tolikoj estas pravaj. Nia bazo estas ke ni devas agi kvazaŭ la estonta vivo ne estus, ĉu ĝi ekzistas ĉu ĝi ne ekzistas. Prediki al la popolo la estontan nevivon, tio estas servi al ĝi ĉar tio estas ĝin eksciti peni en la estanto. Prediki al ĝi la estontan vivon, tio estas ĝin dormigi, kaj eble ĝin trompegi, igi ĝin perdi ĉion por kurigi ĝin al vanaĵo.

— Iam la grandaj homoj vivis je l'elspezoj de l'aliaj. Aleksandro, Napoleono estis grandaj malestimante la homan genton. Tio ne plu estos.

— Ni ne devas serĉi konstanton en la Historio. Tuj kiam evoluaĵo atingis sian maturecon, la putro komenciĝas. La regado de Julio estis ĉe sia matureco je 1840. De tiam la malbono, kiun ĝi entenis fariĝis ĉiutage pli netolerebla. Ĝis tiam ĝi estis kaŝita per la malrapida kresko. La malbono ne aperas dum la kreskada periodo, sed tuj de la matureco, ĝi senmaskiĝas.

— Mi mortas en la religio de l'estonto.

Trad. R. D.

---

La rajtoj kaj la leĝoj ia konstante  
Transpasas kvazaŭ malsanec'ĉiama :  
Al idoj kaj praidoj treniĝante,  
Nerimarkate, restas la enhavo sama.  
Suferojn kaŭzas, kio estis beno;  
Prudento nune malprudent'fariĝis.  
Ve al la idoj! Leĝo estas ĉeno,  
Se ne samtempe ĝi kun ni naskiĝis.

(El : Goëthe, "Faust")

Kiun religion mi konfesas? Neniun el ĉiuj, kiujn vi citas al mi. Kaj kial neniun? Pro religio!

(Diro de Schiller.)

TRAD. O. BÜNEMANN.

---

**AVIZO. — Sendu senprokraste la kotizon : ni devas tuj pagi la ŝuldojn.**

Scanné avec CamScanner

# LA SOCIETO

## La Komitato por la Jaro 1909-1910

*Prezidanto :* S-ro Jules WOLF, La Chaux-de-Fonds (Svisujo).
*Vicprezidanto :* S-ro D-ro A. BATEK, Pizen (Bohemujo).
*Sekretario-kasisto :* S-ro R. DESHAYS, Sens (Francujo).
*Komitatanoj :* F-ino Helen FRYER, 39 Calais gate Camberwell park, London (Anglujo).
S-ro Oscar BÜNEMANN, ĉe firmo Hugo Hartig Neuerwall 44, Hamburg 36 (Germanujo).
S-ro A. GUILLEMIN, Chalet Esperanto 92, sente des Blanches, Houilles S.-&-O. (Francujo).

## NOVAJ ALIĜOJ

F-ino Ant. JANALIKOVA, instruistino, Bystrice-Hostyn, Aŭstrio Moravio.
S-ro Methodêj CHYLA, Prostêjov. Aŭstrio Moravio.
S-ro Léon ROSENSTOCK, ul. Basztowa 27, Krakow, Aŭstrio Galicio.
F-ino C. BEYNARD, av. des Ecoles 30, Villemomble, Seine (Francujo).
S-ro L. FERENCOWICZ, str. Chmielna 71, Varsovio (Polujo).
S-ro Mihai TIMUŜ, Rosiori (Ilfov) (Rumanujo).
Entute 147 membroj.

## KASO. — Januaro

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | Fr. 64.85 |
| | Kotizo de Timuŝ | 2.40 |
| | — Janalikova | 2.40 |
| | — Cornet | 2.50 |
| | — Roux, | 2.50 |
| | — Hinglais | 2.50 |
| | — Grosset (2 jaroj) | 5.00 |
| | — Baudoin (kompletigo) | 3.00 |
| | — Mahn (2 jaroj) | 5.00 |
| | — Kaule (2 jaroj) | 5.00 |
| | — Mariette kun kolekto 1908-09 | 5.00 |
| | — Kuhl | 2.50 |
| | — Rosenstock | 2.50 |
| | — Fridrich | 2.45 |
| | — Chyla | 2.45 |
| | SUME | 110.15 |
| *Elspezoj* : | Sendo de la Decembra bulteno | 10.65 |
| | Poŝtmarkoj | 2.50 |
| | Poŝtenspezigoj | 1.95 |
| | SUME | 15.10 |

Restas en kaso, Fr. : 95.05 = ₷ 37.59.
Ŝuldoj : Konto de la presisto 26 Dec. 294
— — 11 Jan. 18.10 = 312.50 (₷ 123.72).

---

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*
*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER. Chalon-s-Saône (Francujo)

BULTENO
DE
Libera Penso
Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — Nº 10-11. Junio-Julio

# NIA ĜENERALA KUNVENO

Ĝi okazos en Bruselo Lundon 22-an de Aŭgusto je la 9-a matene ĉe la sidejo de la Universala Kongreso de la Libera Penso.

Laŭ la regularo la sekretario legos raporton kaj kontojn pri la societa jaro finiĝanta. Poste ĉar nenia preciza propono prezentiĝis, oni diskutos pri la stato kaj agado de la societo, la redaktado de l'bulteno : montriĝis du malsamaj opinioj ĉe niaj membroj, unu por filozofa publikaĵo kun pacigaj temoj, alia por decida defendo de ĉiu aktuale perfortata esprimlibereco : ni devos ĉu elekti inter ili, ĉu peni por ilin akordigi en du fakoj diverse neŭtralaj kaj precipe organizi anstataŭ nia malbelaspekta bulteno veran gravan revuon, eble nur trimonatan.

Fine ni balotos komitatanojn. Laŭ lotado ĵus farita antaŭ membroj en Sens, eliras S-roj Deshays kaj Wolf. Ambaŭ juĝas ke ŝanĝo de personoj en la funkcioj estas nepre bona, kaj deziras ne reelektiĝi.

Se la kunvenontaj membroj ne estus sufiĉe multaj, ni devus anstataŭigi la kunvenon per skriba konsiliĝo por kiu ni utiligus la informojn ricevotajn pri la propagando en Bruselo ĉe la Universala Kongreso de Libera Penso kaj en Washington ĉe la Esperantista Sesa Kongreso. Espereble la rezultatoj necesigus pligrandigon de la nombro de la komitatanoj, kio estas konforma je la regularo.

## Internacia kaj Universala Kongreso

Ni sendas al ĉiu societano markon de la Internacia Federacio rajtigantan ĉeesti la kongreson. Ĉiu societo havas nur unu voĉon en balotoj; ĉar neniu alia komitatano

promesis nepre veni, la sekretario reprezentos la societon. Sed ĉiu ano agu ĉe sia nacia l. p. asocio por postuli, kiel ni proponos, enkondukon de Esperanto en la internacian oficon de la Federacio.

S-ro Dons, kasisto de la Federacio, skribis ke la propono estos farata de li. Aliparte nia agema societano en Antwerpen S-ro Schoofs praktike kaj morale preparos nian propagandon; en Antwerpen ni intencas organizi esperantistan liberpensan kunvenon post la kongreso en Bruselo. Ni ne forgesu, ke la Sepa Esperantista kongreso okazos en Antwerpen kaj bonŝance S-ro Schoofs estas membro de la "Sepo por la Sepa".

Por loĝado en Bruselo oni skribu ĉu al S-ro Deshays en Sens, ĉu rekte al S-ro Dons, 155, rue St-Bernard, St-Gilles — Bruxelles.

### *Programo de la Kongreso*

| | | |
|---|---|---|
| Dimanĉon 21 | 9 h. 1/2 | Popola manifestacio kun standardoj. |
| — | 10 h. 1/2 | Sur la Granda Placo, meto de ŝtono en honoro de Ferrer. |
| — | 2 h. 1/2 | Solena malfermo sub prezido de Anatole France kaj Haeckel. |
| — | 6 h. | Festeno. |
| Lundon 22 . . | 9 h. | *(Nia ĝenerala Kunveno).* |
| — | 10 h. | Kaj 2 h. Seancoj de la kongreso. Tagordo : Pri la libereco de konscienco kaj ĝiaj garantioj en la diversaj landoj. |
| — | 5 h. | Akcepto ĉe la Urba Domo. Literatura kaj muzika festo. |
| Mardon 23 . . | 9 h. | Seanco ; 2 Vizito de l'Ekspozicio : festo. |
| Merkred. 24 | 10 h. | Plena Seanco de la Federacio. |
| — | 2 h. | Vizito de la raciista Orfejo. |

## Ĉe la Sesa Esperantista Kongreso en Washinghton

S-ro Schubert organizas seancon de la Societo Libera Penso ĉe la kongreso. Malmultaj el niaj Eŭropaj anoj eble ĝin ĉeestos, sed ĝi estos, kiel la Brusèla kunveno, almenaŭ propaganda seanco : kun niaj Usonaj membroj la novaj aliĝantoj diskutos pri la administracio kaj agado

Scanné avec CamScanner

de la Societo speciale en Ameriko, kie la stato kaj la kondiĉoj de la Libera Penso estas ja tre malsamaj ol ĉe ni. Tiel do nova kampo malfermiĝos al nia agado kaj ni alproksimiĝos al vera universaleco. Bonan kuraĝon kaj sukceson al niaj sindonaj reprezentantoj en Washington !

Andrzej Niemojewski

# KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

Tradukis Frank Sandecki

*(Daŭrigo)*

*Andrzej Niemojewski, la fama pola liberpensulo kies verkon ni publikigas, senĉese suferas konfiskojn kaj procesojn pro episkopaj denuncoj. Lian lastan verkon « Dio Jezuo », konfiskitan de la rusa cenzuro, germane eldonos la librejo Huber Frères en Winterthur (Svisujo)).*

D. Kiu, laŭ instruado de eklezio kreis la homon?
R. Dio.
D. Kaj kion vi diras?
R. La homon naskigis patro kaj naskis patrino.
D. Kaj patron?
R. Avo.
D. Kaj avon?
R. Praavo. Kaj tiel plu. La homoj civilizataj devenas de homoj ne civilizataj, homoj ne civilizataj devenas de sovaĝuloj, la sovaĝuloj devenas de estaĵoj duone bestoj, la estaĵoj duonbestoj, devenas de bestoj. Tiel perfektigis la naturo siajn kreitaĵojn. Estas do la espero, ke kiel ne ankoraŭ homo produktis la homon, tiel la homo produktos superhomon. Mia optimismo apogas sin sur la certa observado de faktoj.

*(Daŭrigota)*

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro N.-G. GHINESCU, 4 str. Toamnei, Bukureŝto, Rumanujo.
S-ro G. SEDMIK, Halkova tr. č. 78, Kral. Vinohrady, Bohemujo.
S-ro L.-A. ORSATTI, 1536 Sansom str. PHILADELPHIA, Usono.
S-ro Dick SODERSTROM, Vesijarvi, Finnlando.
S-ro E. FASCE, 4, Chiassone, Genova, Italujo.
S-ro HERMANT, 7, rue Toullier, Paris, Francujo.
S-ro Marius ROE, 23, Krugerplein, Bargerhout-Antwerpen, Belgujo
S-ro BAREND SCHOEN, 84, Guldensporenstr., Bargerhout-Antwerpen, Belgujo.

*Eksiĝis* : S-ro Burlotte ; *mortis* S-ro Burgos.

*Eksigitaj* pro nepago S-roj Vasiljev, Zinovjev, Essigmann, Gogueliani, Aparici, Tarbouriech, Reiss, Maréchal, Drasta, Herlas, Hempel, Alec, Bailey, Taylor, Hartley, Neumann, Kreidl, Georgiev, Auerbach, Bendix, Fischer, Kleider, Werner, Borisov. Entute : 129 memb.

Scanné avec CamScanner

## KASO. — Majo-Junio-Julio 1910

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj.— | Reportite | 239.90 |
| | Kotizo de Tavener | 2.50 |
| | Fryer | 2.50 |
| | Beynard | 2.50 |
| | Forestier | 2.50 |
| | Burlotte | 2.50 |
| | Schaummburg | 2.40 |
| | Mareŝ | 2.40 |
| | Boucon | 2.50 |
| | Batek | 2.50 |
| | Curchod | 2.40 |
| | Camescasse | 2.50 |
| | Sôdestrôm | 3 |
| | Padfield | 5 |
| | Vaucher | 2.40 |
| | Fasce | 2.40 |
| | Redondo 1910-11 | 2.50 |
| | Hermant (Parizo) | 2.50 |
| | Moch | 3 |
| | Laisant 2 jaroj | 5 |
| | Muinos (4 ekzempleroj) | 9.90 |
| Kot. de ĉiama membro Deshays | | 50 |
| Kot. de ĉiama membro Camescasse | | 50 |
| Vendo de broŝuroj Pledo p.F | | 52.45 |
| Vendo de propag. poŝtkartoj | | 5.65 |
| | SUME | 446.50 |
| Elspezoj. — | Sendo de Mart-aprila bulteno | 11.40 |
| | Sendo de Maja bulteno | 10.75 |
| | Poŝtmarkoj | 8 |
| | Transportelspezoj | 0.90 |
| | Sendo de broŝuroj Pledo p.F | 1.90 |
| | Sendo de propag. p-kartoj | 1.25 |
| | Pago al la presisto 348.70 kaj 53.10 | 401.80 |
| | SUME | 421.70 |

Restas en kaso, Fr. : 24.80 = (₷ 9.82).
Ŝuldate al S-ro Bŭnemann Fr. 16.55 (₷ 6.56)
Broŝuroj deponitaj 555, en magazeno 1800.

*Ĉiun lastatempan komunikon (de 15 aŭg.) oni adresu al S-ro Deshays ĉe la Ĝenerala Sekretariejo de la Libera Penso, 50, rue du Remblai, Bruxelles.*

---

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*
*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

Scanné avec CamScanner

Jaro 1910-1911. — No 1-2. Septembro-Oktobro 1910.

# BULTENO de ★LIBERA PENSO★

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo. | Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

## LIBERA PENSO

INTERNACIA SOCIETO ESPERANTISTA DE LIBERPENSULOJ

### Societa Regularo

1. — La internacia Societo Libera Penso celas :

1-e, Helpi la liberan esprimon kaj komunikadon del ideoj pri ĉiu teoria kaj praktika temo, defendi tiun liberecon kontraŭ ĉiu ajn premado kaj malrespekto, kaj organizi universalan liberpensan opiniantaron inter la eminentuloj kaj en la popoloj mem ;

2-e, Plifaciligi la taskon del aliaj liberpensaj societoj kaj federacioj propagadante inter ili la scion kaj uzadon de Esperanto.

Ĝi malpermesas al si alpreni oficiale ian solvon de la diversaj problemoj, kies liberan diskutadon ĝi starigos en si mem kaj ebligos, laŭ sia povo, inter la tuta homaro.

2. — La ĉefaj rimedoj por la agado de la societo estas :

Publikigi en bulteno dokumentojn pri la liberpensa movado, senpere senditajn de ĉiunaciaj korespondantoj ;

Eldoni esperantan tradukon de la precipaj verkoj rilataj al ĝia celo kaj verkojn originalajn en Esperanto ;

Klopodi per privataj aŭ publikaj paroladoj, per opaj postuloj aŭ personaj influoj kontraŭ ĉiuj baroj kaj privilegioj malhelpantaj la liberecon del penso ;

Fondi regionajn Grupojn por doni sciigojn pri universala liberpenso, ekzemplon de spirita sendependo kaj reciproka respekto, subtenon al personoj persekutataj pro esprimo de opinio.

3. — Ĉiu persono deziranta kunlabori por la tasko difinita en la unua artikolo povas partopreni en la Societo.

La peton por akcepto oni povas sendi ĉu al la Centra Komitato, ĉu, se Grupo ekzistas en la loko, al la Komitato de tiu Grupo.

Societano, kiu pruvite agis kontraŭ la celo de la Societo, povas esti eksigata de la Komitato mem, kiu lin alprenis, sed nur estinte ebligata doni siajn buŝajn aŭ skribajn klarigojn.

4. Ĉiu societano pagas ĉiujare kotizon po 1 spesmilo (2,50 fr. ; 2 mark. ; 2 ŝil. ; 0,50 dol. ; 1 rublo ; 2,40 kron. ; 1,20 hol. flor. ; 1 jen).

La societa jaro komenciĝas je la ordinara ĝenerala kunveno.

5. — Membroj donaculoj estas la personoj, kiuj pagas ĉiujaran kotizon 10 sm.

Oni povas anstataŭigi sian kotizon per unu sola pago dudekobla, kiu rajtigas por la jenaj titoloj : 20 sm., ĉiama membro ; 200 sm., ĉiama donaculo.

6. — La titolon honora membro povas doni la Centra Komitato aŭ la ĝenerala kunveno al personoj, kiuj faris grandan servon al la Societo. De tiuj membroj nenia kotizo estas postulebla.

7. — La Societo petadas kaj danke akceptas ĉiujn donacojn, kiuj povas helpi ĝian agadon.

8. — Ĉiu kotizo ne pagita dum la unua jarkvarono estas enspezata per la poŝto, kaj la prokrastinto devas pagi la poŝtajn kostojn. Se tiu ĉi ne pagis, la Centra aŭ Loka Komitato povas proklami lin eksiĝinta.

9. — La enpreso de la kotizoj kaj donacoj en la plej proksima numero de la bulteno taŭgas kiel kvitianco.

10. — La Societo estas administrata de Centra Komitato, balotita por tri jaroj en la ĝenerala kunveno ordinara.

La Komitato renoviĝas po unu triono ĉiujare. La elirintaj membroj estas reelekteblaj.

11. — La Komitato balotas sian estraron, kiu estas ankaŭ la estraro de la Societo.

12. — Ĉiujare la Societo havas ĝeneralan kunvenon, kies loko kaj tempo kiel eble koincidas kun tiuj ĉu de Universala Kongreso de Esperanto, ĉu de Kongreso de la Internacia Federacio de la Libera Penso.

13. — La Ĝenerala Kunveno ordinara ricevas la raporton kaj ĉiujn komunikojn de la Komitato, aprobas la kontojn,

Scanné avec CamScanner

kaj diskutas pri la demandoj rilataj al la funkciado de la Societo.

Ĝi balotas la komitatanojn per sekreta voĉdono, kaj laŭ la plimulto de la esprimitaj voĉoj.

La voĉdono per letero estas permesata.

14. — Krom tio la Societo povas esti kunvokata por ĝenerala kunveno eksterordinara, ĉu per la iniciato de la Centra Komitato, ĉu laŭ skriba peto de almenaŭ 50 societanoj, post skriba aprobo de la plimulto.

15. — Loka Grupo devas enhavi almenaŭ 10 membrojn.

16. — La Lokaj Grupoj estas tute sendependaj, tiel de la Societo, kiel unu de alia.

La fonda regularo de ĉiu Grupo devas enhavi la 1-an artikolon de tiu ĉi regularo, sen ia kondiĉo kontraŭa. La Grupoj transdonas al la Societo la kotizojn de siaj membroj, kaj organizas laŭvole sian propran budĝeton.

17. — Sanĝoj en tiu fonda regularo povas esti farataj nur per skriba voĉdono post konsiliĝo en Ĝenerala Konveno.

18. — En okazo de finiĝo de la Societo, ĝia havo, kun la havo de la Lokaj Grupoj, estos donacata al la Internacia Federacio de la Libera Penso, aŭ, se ĝi ne plu ekzistas, al ia Societo simila.

# NIA BULTENO

—o—

Jen kreskintan organon plezure prezentas la Societo LIBERA PENSO al siaj membroj, al la nialingva gazetaro, al ĉiuj esperantistoj kaj liberpensuloj en la mondo. Nun pli granda amplekso ebligos klare distingi en nia bulteno malsemajn partojn sub la jenaj titoloj : 1e La Ideoj, por filozofiaj temoj diskutotaj kun plej liberama toleremo ; tiajn artikolojn oni sendu al komitatan Schubert. 2e La liberpensa Batalo, por informoj pri ĵusaj okazintaĵoj rilataj al persekuto, malcedo, batoj aŭ sukcesoj de la defendantoj de la esprimlibereco en ĉiu lando kaj partio ; tiun parton redaktos Ges-roj O. Bünemann, espereble per komunikoj de ĉiulandaj anoj. 3e La Societo, por niaj administraj kaj propagandaj aferoj. Ankaŭ interŝanĝo de anoncoj etendos nian agadon.

La presigon zorgas komitatano Schoofs en Antwerpen. Helpu ĉiu nian kreskon, por la venko de Esperanto kaj de la Penso Libera !

# Al la Liberpensaj Societoj

——

## Raporto pri Esperanto

La jenan raporton en franca lingvo ni sendis al la Konisiono organizonta Konsiliĝon de l'naciaj asocioj por la Universala L. P. Kongreso 1912 en München. Ni insiste petas niajn anojn (krom la franclingvaj), ke ili traduku ĝin kaj sendu al siaj naciaj L.P. gazetoj kaj lokaj societoj aŭ ĵurnaloj. Ili bonvolu nin informi pri la plenumo de tiu tasko.

—o—

La Internacia Esperantista Liberpensa Societo LIBERA PENSO, aliĝinta al la Internacia Federacio de la Libera Penso :

Konsiderante, ke la internacia helpa lingvo Esperanto ĉiutage en ĉiuj landoj grande progresas kaj povas efike helpi la liberpensan movadon ; ke aliparte estas utile interesigi la esperantistaron pri niaj ideoj kaj nia agado.

Konsiderante la multajn kaj gravajn maloportunaĵojn, kiujn alportas la diverseco de la lingvoj al la diskutoj de l'internaciaj kunvenoj kaj al la korespondado kun la societoj de ĉiu nacio.

Konsiderante, ke la uzo de Esperanto povas tuj doni netakseblan helpon al la internaciaj asocioj pro ĝia facileco, precizeco kaj fleksebleco, provitaj per praktikado de dudekjaraj tre diversaj aplikoj kaj ses universalaj kongresoj.

Prezentas denove al la Kongreso la proponon, kiu ne povis esti diskutata ĉe la kongreso en Prago (1907) pro manko de tempo :

1e Alpreni la internacian lingvon Esperanto kiel helpan lingvon oficialan en la diskutoj de l'internaciaj kongresoj de la Libera Penso.

2e Alpreni la uzadon des Esperanto por la korespondo de l'konstanta oficejo de la Internacia Federacio de la Libera Penso kaj en ĝia jarlibro.

Por faciligi la aplikon de la dua deziro, la Esperantista Societo Libera Penso komunikos al la sekretariejo de la Federacio liston de korespondantoj en ĉiuj landoj tradukontaj de sia nacia lingvo en Esperanton kaj reciproke ĉiujn leterojn kaj dokumentojn por la Konstanta Oficejo.

Tia estas, Karaj Kamaradoj, la propono, kiun ni submetis al la Internacia Federacio de la Libera Penso kunveninta plenkunside merkredon 24 an de Aŭgusto en Bruselo. Ĉio esperigis al ni la sukceson : la urĝeco de l'demando, la malfruiĝoj kaj malfacilaĵoj tro evidentaj, kiujn ĵus alportis al la kongresaj laboroj la diverseco de la lingvoj, fine la favora akcepto ricevita de la esperantista delegito, kiam, eldirinte en Esperanto je la malferma kunsido la saluton de la societo al la ĉeestantaro kaj ĝian respektesprimon al Ferrer, li estis en franca lingvo petegita la liberpensulojn ekkapti la novan armilon, kies povon niaj kontraŭuloj jam komprenis kaj utiligis (Universala Katolika Kongreso en Parizo, Paske 1910 ; 3 katolikaj revuoj en Esperanto).

Se la decido estis prokrastata, tio estas pro la malregula interveno de iu ĉeestanto, kiu ne devis paroladi, unue tial ke li estis delegita de nenia societo kaj sekve neniel rajtis partopreni la administran kunsidon je la merkredo, poste tial, ke li ne estas senpartia en la disputo, estante mem aŭtoro de projekto de internacia lingvo, fine tial, ke li translokigis la demandon, diskutante la teorian perfektecon de la lingvo, dum la temo estis pri ĝia tuja kaj praktika utileco, kiu estas fakto. Ekzistas ĉirkaŭe 1500 esperantistaj grupoj, 106 revuoj naciaj kaj profesiaj en Esperanto, kaj biblioteko enhavanta proksimume 1400 verkojn ĉiuspecaj.

Scanné avec CamScanner

Sed ni opinias, Kamaradoj, ke ni ne devas bedaŭri tiun prokraston: ne nur ĝi ne estas enterigo de nia propono, sed ĝi ebligas al ni vin dokumentigi kaj pligrandigos la efikon de decido, kiun vi estos preníntaj post universala kaj pripensita konsiliĝo.

Ni ne insistos pri la servoj de lingvo sufiĉe preciza, por esti alprenita de sciencistoj kiel Berthelot, patroninta la Sciencan Revuon je ĝia naskiĝo, De Saussure, kiu ankoraŭ estas ĝia direktoro, Sebert, Bouchard, Huntington, Boirac, kiuj publikigis sciencajn verkojn en Esperanto; precipe kiam tiu lingvo samtempe estas sufiĉe facila, por esti instruata al malkleruloj. Ĝi ebligos al ĉiuj niaj batalantoj ne nur tiun proksimuman komprenadon, tiun duonan uzon, kiun oni tro ofte rimarkas pri la fremdaj lingvoj en Kongresoj, sed senperan komunikon plenan kaj propramovan de la fluanta parolo, de la penso mem je naskiĝa stato, kia ĝi sin prezentas, viva kaj sincera, en frataj konfidencioj de familia konversacio. Pri la publika parolado, ĉar estas en Esperanto nek esceptoj nek malfacilecoj, oni estas certa, tie neniam esti malkorekta kaj ridinda.

Pri Esperantista Societo de Libera Penso, jen ĝiaj meritoj por via bonvola atento. Unue ĝi estas unu el tiuj, kiuj estas mone kvitaj kun la Federacio, eĉ malgraŭ malfacila situacio: ĉar ĝi postulas jare nur Fr. 2.50 kiel kotizaĵon kaj liveras al siaj membroj monatan bultenon. Ĝi havas proksimume 150 membrojn, reprezentantajn 20 diversajn naciojn. Novembre je lasta jaro, por honori la martiron, kies agadon kaj memoron ni ĵus gloris kaj kiu estis unu el niaj unuaj anoj, la Societo eldonis en broŝuro kun franca kaj esperanta teksto la pledon diritan por Ferrer ĉe la militkonsilantaro, de kapitano Galceran. Ĝi publikigas en la bulteno verkon de nia amiko Niemojewski, konfiskita en Polujo de la cenzuristaro, la Kateĥismon de l'Liberpensuloj. Ĝi atendas por grandigi sian ĵurnalon kaj pliintensigi sian agadon nur aliĝon de niaj amikoj ĉiulandaj, kiuj, antaŭpravigante la sankcion de la venonta kongreso, nepre deziros ne lasi akapari unufoje plu de l'defendantoj de l'estinto eltrovon, kiun la scienco kaj la konscienco modernaj liveris por la universala liberigo.

Ni plezure nin prezentas je la dispono de ĉiuj Liberpensuloj por pluaj informoj kaj por SENPAGAJ KURSOJ DE ESPERANTO PER KORESPONDO, kaj en la naciaj liberpensaj gazetoj.

La sekretario de la Societo LIBERA PENSO
R. Deshays, Sens, Francujo.

## LA KOMITATO
## por la societa jaro 1910-1911.

—:—

Prezidanto: S-ro O. Bünemann, Eidelstedterweg, 121 a/3, Hamburg 31.

Vicprezidanto: S-ro D-ro A. Batek, Plzen, Bohemujo.

Sekretario-kasisto: S-ro R. Deshays, Sens, Francujo.

Redaktoroj de bulteno: La Ideoj: S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington; La liberpensa batalo: Ges. Bünemann. Presigo: S-ro F. Schoofs, 45, Kleine Beerstr., Antwerpen, Belg.

Komitatanoj: F-ino Helen Fryer, 20, Calais gate Camberwell park, London S. E.; S-ro A. Guillemin, Chalet Esperanto, Houilles (Seine & Oise) Francujo.

### LE KUNVENO DE LIBERA PENSO ĈE LA SESA

Ĝi estis plej interesa interparolado de liberpensemaj kongresanoj, sed ne kunsido de nia societo. S-ro Schubert skribas, ke li tre esperas varbi multajn amerikanojn, kiam oni povos prezenti al ili vere valoran organon. Nu, la nuna reorganizo de la bulteno estas jam, kiel ni esperas, unua paŝo en tiun direkton.

### LA VOĈDONO POR RENOVIGO DE LA KOMITATO

Ĝin partoprenis 50 societanoj. Elektiĝis S-roj Schubert per 48 voĉoj, Schoofs 49, Deshays 50 kiel komitatanoj; kaj kiel rezervaj S-roj Wolf 47, Fridrich 48.

**HONORMEMBRO:** S-ro J. Dons, 155, rue St-Bernard, St-Gilles-Bruxelles.

Ni jam diris en la raporto pri la L. P. Kongreso, kiel sindona kaj efektive favora al nia Esperantista Societo montriĝis tiu plej agema veterano de la belga liberpenso.

### Andrzej Niemojewski

# KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

**Tradukis Frank Sandecki**

(Daŭrigo)

Andrzej Niemojewski, la fama pola liberpensulo kies verkon ni publikigas, senĉese suferas konfiskojn kaj procesojn pro episkopaj denuncoj. Lian lastan verkon « Dio Jezuo », konfiskitan de la rusa cenzuro, germane eldonos la librejo Huber Frères en Winterthur. (Svisujo).

D. Kaj kion instruas eklezio?

R. La instruado de eklezio kondukas al ekstrema pesimismo. La homoj kreitaj de Dio laŭ lia formo kaj simileco, jam en unua generacio ŝtelas kaj mensogas, en dua jam reciproke sin mortigas, poste tiel malsuprenfalas, ke Dio devas ilin ĉiujn ekdronigi. Li restigas la plej bonajn, por ke ili multiĝu, tamen estas ankoraŭ pli malbone. Do li sendas al ili sian Filon, por ke li enkonduku ilin sur la vojon de vero. Dume ili tiun-ĉi lian filon pendigis. Do li preparis al ili inferon por ke en ĝi ili estu bakataj jarcentojn de jarcentojn.

D. Kiel vi nomus la teran potenculon, kiu kondamnus milionojn da homoj je la brulado?

R. Mi nomus lin kruelulo aŭ frenezulo.

D. Do kio estus tia Dio, kvazaŭ la plej mizerikorda, la idealo de bono?

R. Fabelo, elpensita de pastraro por restigi malsaĝajn homojn en eterna timo kaj trompi ilin per espero de di graco; se ili obeos al pastroj.

D. Ĉu ne estas bela ajo la dio graco?

R. Mi estas homo libera kaj mi bezonas nenies gracon. Se Dio ordonus al mi genufleksi antaŭ li, li estus fierulo. Fierulo faras lin ĉiu katolika kateĥismo, dirante ke Dio kreis mondon por pligranda sia gloro.

D. Do Dio ne kreis la mondon?

R. Nur ni homoj, havantaj nian komencon kaj finon al ĉio la Saman komencon kaj finon naive alskribas. La mondo havas nek finon, nek komencon. Ekzistas nur konstanta kunmetiĝo kaj dismetiĝo de diversaj elementoj. La scienco esploras tion, porxkoni kian potencon posedas homo en la tutmondo kaj kiel al li helpi por trapasi la vivon kiel eble maldanĝere kaj feliĉe.

D. Do kio vi estas?

R. Parteto de eterna mondo.

D. Kio konvinkas pri ĝia eterneco?

R. Maldifektemaj ĝiaj elementoj.

D. Ĉu vi ne timas morton?

R. Mi timis antaŭe. Ĉi-tiun timon donis al mi naturo, por ke mi defendu mian vivon. Hodiaŭ mi liberigis min de ĝi, ĉar la batalilon de timo mi anstataŭis per la batalilo de scienco.

D. Sekve vi mortos?

R. Mi mortos, kiam estos elĉerpita mia organismo, kaj ĝi ne povos pli adapti sin al la kondiĉoj de estado.

D. Vi diras tion tiel trankvile?

R. Ĉar la prudenta homo ne lasos trompi sin per iaj timoj. Mi restos eterne en naturo, disĵetita en atomojn. Mi eliris el naturo kaj mi revenos al naturo.

D. Do vi tuta vivas tere?

R. Pri la tereco povas opinii mia intelekto. Ĉion ekster la tereco mi lasas al naturo.

D. Kio do anstataŭas al vi la eklezion?

R. La lernejo.

D. Kion ĝi donas al vi?

R. La sciencon.

D. Kaj kion vi ŝuldas al ĝi reciproke?

R. Zorgi pri tio, ke ĝi ĉiam estu sendependa.

(La fino aperos en la proksima numero).

## LA SOCIETO

### NOVAJ ALIĜOJ

Liberiga Stelo en Sens, ĉe la Kooperativa societo, Francujo.

Sekcio de la « Ligue des Droits de l'Homme », Sens, Franc.

Laborista Esperanta Grupo, S° F. Zuckarolli, B/Strohhause 31/e III, Hamburg 5, Germanujo.

S-ro Jan Jacobs, Boomsche steenweg, 444, Antwerpen.

S-ino Olga Ptacnikova, Turnow 441, Bohemujo.

S-ro Selimir Machiela, Kod. A. Lecevica, 7 via del Municipio Rijeka (Fiume), Aŭstrio.

S-ro Julien Chevalier, 243 Vestingstr., Berchem-Antwerpen, Belgujo.

Eksigitaj: S-roj Danihelovsky, Delaroue, Felser, Mihich, Mikoch, Ŝmeic.

Entute 135 membroj.

### Kaso Septembro-Oktobro

| | | |
|---|---|---|
| **Enspezoj:** | Reportite | 36.10 |
| Kotizaĵoj de Maranhão | | 4.90 |
| Raczi | | 2.40 |
| Van Gansen | | 2.50 |
| Ges. O. Bünemann | | 5.10 |
| Laborista Gr. Hamburg | | 2.40 |
| Ptacnikova | | 2.40 |
| Machiela | | 2.40 |
| Schreyer 1910-11 | | 5.00 |
| Vendo de broŝuroj Pledo p. F. | | 0.70 |
| Vendo de propagandaj kartoj | | 2.30 |
| | Sume | 66.20 |

| | |
|---|---|
| **Elspezoj:** | |
| Paperoj kaj kovertoj | 2.65 |
| Sendo de l'Aŭgusta bulteno | 10.90 |
| Poŝtmarkoj | 2.00 |
| Preso de la julia bulteno | 18.10 |
| Sendo de broŝuroj kaj kartoj | 0.80 |
| Sume | 34.45 |

Enkaso Fr. 31.75 (Sm 12.58).

Ŝuldo por preso de l'aŭg. bulteno Fr. 21 (Sm 8.36).

Ŝuldo al S-ro O.B. Fr. 5 (Sm 2).


Estas malfermita por 1911 jaro abono de la gazeto

"LA ONDO DE ESPERANTO"

(laŭ la adreso: 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Jara abonpago 2 rubl. (2,120 sm.)

Dum la 3-a jaro de sia ekzistado tin ĉi sola ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 16-paĝaj numeroj la librojn:

1) A. RIVIER. EN RUSUJO PER ESPERANTO.

(130-paĝa originala priskribo de peresperanta vojaĝo de la Alĝera aŭtoro en Rusujo).

2) V. DEVJATNIN. PLENA VERKARO.

3-a vol. 140 paĝe libro.

Apartaj kajeroj de la ĵurn. 15 sd., de la verko de Rivier 64 sd., Devjatnin 65 sd.



Presejo Esperantista: J. B. Madou-Cop, Antwerpen.


Scanné avec CamScanner



Jaro 1910-1911. — No 1-2. Septembro-Oktobro 1910.

# BULTENO de ★LIBERA PENSO★

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo. | Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

## LIBERA PENSO

INTERNACIA SOCIETO ESPERANTISTA DE LIBERPENSULOJ

### Societa Regularo

1. — La internacia Societo Libera Penso celas :

1-e, Helpi la liberan esprimon kaj komunikadon del ideoj pri ĉiu teoria kaj praktika temo, defendi tiun liberecon kontraŭ ĉiu ajn premado kaj malrespekto, kaj organizi universalan liberpensan opiniantaron inter la eminentuloj kaj en la popoloj mem ;

2-e, Plifaciligi la taskon del aliaj liberpensaj societoj kaj federacioj propagadante inter ili la scion kaj uzadon de Esperanto.

Ĝi malpermesas al si alpreni oficiale ian solvon de la diversaj problemoj, kies liberan diskutadon ĝi starigos en si mem kaj ebligos, laŭ sia povo, inter la tuta homaro.

2. — La ĉefaj rimedoj por la agado de la societo estas :

Publikigi en bulteno dokumentojn pri la liberpensa movado, senpere senditajn de ĉiunaciaj korespondantoj ;

Eldoni esperantan tradukon de la precipaj verkoj rilataj al ĝia celo kaj verkojn originalajn en Esperanto ;

Klopodi per privataj aŭ publikaj paroladoj, per opaj postuloj aŭ personaj influoj kontraŭ ĉiuj baroj kaj privilegioj malhelpantaj la liberecon del penso ;

Fondi regionajn Grupojn por doni sciigojn pri universala liberpenso, ekzemplon de spirita sendependo kaj reciproka respekto, subtenon al personoj persekutataj pro esprimo de opinio.

3. — Ĉiu persono deziranta kunlabori por la tasko difinita en la unua artikolo povas partopreni en la Societo.

La peton por akcepto oni povas sendi ĉu al la Centra Komitato, ĉu, se Grupo ekzistas en la loko, al la Komitato de tiu Grupo.

Societano, kiu pruvite agis kontraŭ la celo de la Societo, povas esti eksigata de la Komitato mem, kiu lin alprenis, sed nur estinte ebligata doni siajn buŝajn aŭ skribajn klarigojn.

4. Ĉiu societano pagas ĉiujare kotizon po 1 spesmilo (2,50 fr. ; 2 mark. ; 2 ŝil. ; 0,50 dol. ; 1 rublo ; 2,40 kron. ; 1,20 hol. flor.; 1 jen).

La societa jaro komenciĝas je la ordinara ĝenerala kunveno.

5. — Membroj donaculoj estas la personoj, kiuj pagas ĉiujaran kotizon 10 sm.

Oni povas anstataŭigi sian kotizon per unu sola pago dudekobla, kiu rajtigas por la jenaj titoloj : 20 sm., ĉiama membro ; 200 sm., ĉiama donaculo.

6. — La titolon honora membro povas doni la Centra Komitato aŭ la ĝenerala kunveno al personoj, kiuj faris grandan servon al la Societo. De tiuj membroj nenia kotizo estas postulebla.

7. — La Societo petadas kaj danke akceptas ĉiujn donacojn, kiuj povas helpi ĝian agadon.

8. — Ĉiu kotizo ne pagita dum la unua jarkvarono estas enspezata per la poŝto, kaj la prokrastinto devas pagi la poŝtajn kostojn. Se tiu ĉi ne pagis, la Centra aŭ Loka Komitato povas proklami lin eksiĝinta.

9. — La enpreso de la kotizoj kaj donacoj en la plej proksima numero de la bulteno taŭgas kiel kvitianco.

10. — La Societo estas administrata de Centra Komitato, balotita por tri jaroj en la ĝenerala kunveno ordinara.

La Komitato renoviĝas po unu triono ĉiujare. La elirintaj membroj estas reelekteblaj.

11. — La Komitato balotas sian estraron, kiu estas ankaŭ la estraro de la Societo.

12. — Ĉiujare la Societo havas ĝeneralan kunvenon, kies loko kaj tempo kiel eble koincidas kun tiuj ĉu de Universala Kongreso de Esperanto, ĉu de Kongreso de la Internacia Federacio de la Libera Penso.

13. — La Ĝenerala Kunveno ordinara ricevas la raporton kaj ĉiujn komunikojn de la Komitato, aprobas la kontojn,

Scanné avec CamScanner

kaj diskutas pri la demandoj rilataj al la funkciado de la Societo.

Ĝi balotas la komitatanojn per sekreta voĉdono, kaj laŭ la plimulto de la esprimitaj voĉoj.

La voĉdono per letero estas permesata.

14. — Krom tio la Societo povas esti kunvokata por ĝenerala kunveno eksterordinara, ĉu per la iniciato de la Centra Komitato, ĉu laŭ skriba peto de almenaŭ 50 societanoj, post skriba aprobo de la plimulto.

15. — Loka Grupo devas enhavi almenaŭ 10 membrojn.

16. — La Lokaj Grupoj estas tute sendependaj, tiel de la Societo, kiel unu de alia.

La fonda regularo de ĉiu Grupo devas enhavi la 1-an artikolon de tiu ĉi regularo, sen ia kondiĉo kontraŭa. La Grupoj transdonas al la Societo la kotizojn de siaj membroj, kaj organizas laŭvole sian propran budĝeton.

17. — Sanĝoj en tiu fonda regularo povas esti farataj nur per skriba voĉdono post konsiliĝo en Ĝenerala Konveno.

18. — En okazo de finiĝo de la Societo, ĝia havo, kun la havo de la Lokaj Grupoj, estos donacata al la Internacia Federacio de la Libera Penso, aŭ, se ĝi ne plu ekzistas, al ia Societo simila.

# NIA BULTENO

—o—

Jen kreskintan organon plezure prezentas la Societo LIBERA PENSO al siaj membroj, al la nialingva gazetaro, al ĉiuj esperantistoj kaj liberpensuloj en la mondo. Nun pli granda amplekso ebligos klare distingi en nia bulteno malsemajn partojn sub la jenaj titoloj : 1e La Ideoj, por filozofiaj temoj diskutotaj kun plej liberama toleremo ; tiajn artikolojn oni sendu al komitatan Schubert. 2e La liberpensa Batalo, por informoj pri ĵusaj okazintaĵoj rilataj al persekuto, malcedo, batoj aŭ sukcesoj de la defendantoj de la esprimlibereco en ĉiu lando kaj partio ; tiun parton redaktos Ges-roj O. Bünemann, espereble per komunikoj de ĉiulandaj anoj. 3e La Societo, por niaj administraj kaj propagandaj aferoj. Ankaŭ interŝanĝo de anoncoj etendos nian agadon.

La presigon zorgas komitatano Schoofs en Antwerpen. Helpu ĉiu nian kreskon, por la venko de Esperanto kaj de la Penso Libera !

# Al la Liberpensaj Societoj

## Raporto pri Esperanto

La jenan raporton en franca lingvo ni sendis al la Konisiono organizonta Konsiliĝon de l'naciaj asocioj por la Universala L. P. Kongreso 1912 en München. Ni insiste petas niajn anojn (krom la franclingvaj), ke ili traduku ĝin kaj sendu al siaj naciaj L.P. gazetoj kaj lokaj societoj aŭ ĵurnaloj. Ili bonvolu nin informi pri la plenumo de tiu tasko.

—o—

La Internacia Esperantista Liberpensa Societo LIBERA PENSO, aliĝinta al la Internacia Federacio de la Libera Penso :

Konsiderante, ke la internacia helpa lingvo Esperanto ĉiutage en ĉiuj landoj grande progresas kaj povas efike helpi la liberpensan movadon ; ke aliparte estas utile interesigi la esperantistaron pri niaj ideoj kaj nia agado.

Konsiderante la multajn kaj gravajn maloportunaĵojn, kiujn alportas la diverseco de la lingvoj al la diskutoj de l'internaciaj kunvenoj kaj al la korespondado kun la societoj de ĉiu nacio.

Konsiderante, ke la uzo de Esperanto povas tuj doni netakseblan helpon al la internaciaj asocioj pro ĝia facileco, precizeco kaj fleksebleco, provitaj per praktikado de dudekjaraj tre diversaj aplikoj kaj ses universalaj kongresoj.

Prezentas denove al la Kongreso la proponon, kiu ne povis esti diskutata ĉe la kongreso en Prago (1907) pro manko de tempo :

1e Alpreni la internacian lingvon Esperanto kiel helpan lingvon oficialan en la diskutoj de l'internaciaj kongresoj de la Libera Penso.

2e Alpreni la uzadon des Esperanto por la korespondo de l'konstanta oficejo de la Internacia Federacio de la Libera Penso kaj en ĝia jarlibro.

Por faciligi la aplikon de la dua deziro, la Esperantista Societo Libera Penso komunikos al la sekretariejo de la Federacio liston de korespondantoj en ĉiuj landoj tradukontaj de sia nacia lingvo en Esperanton kaj reciproke ĉiujn leterojn kaj dokumentojn por la Konstanta Oficejo.

Tia estas, Karaj Kamaradoj, la propono, kiun ni submetis al la Internacia Federacio de la Libera Penso kunveninta plenkunside merkredon 24 an de Aŭgusto en Bruselo. Ĉio esperigis al ni la sukceson : la urĝeco de l'demando, la malfruiĝoj kaj malfacilaĵoj tro evidentaj, kiujn ĵus alportis al la kongresaj laboroj la diverseco de la lingvoj, fine la favora akcepto ricevita de la esperantista delegito, kiam, eldirinte en Esperanto je la malferma kunsido la saluton de la societo al la ĉeestantaro kaj ĝian respektesprimon al Ferrer, li estis en franca lingvo petegita la liberpensulojn ekkapti la novan armilon, kies povon niaj kontraŭuloj jam komprenis kaj utiligis (Universala Katolika Kongreso en Parizo, Paske 1910 ; 3 katolikaj revuoj en Esperanto).

Se la decido estis prokrastata, tio estas pro la malregula interveno de iu ĉeestanto, kiu ne devis paroladi, unue tial ke li estis delegita de nenia societo kaj sekve neniel rajtis partopreni la administran kunsidon je la merkredo, poste tial, ke li ne estas senpartia en la disputo, estante mem aŭtoro de projekto de internacia lingvo, fine tial, ke li translokigis la demandon, diskutante la teorian perfektecon de la lingvo, dum la temo estis pri ĝia tuja kaj praktika utileco, kiu estas fakto. Ekzistas ĉirkaŭ 1500 esperantistaj grupoj, 106 revuoj naciaj kaj profesiaj en Esperanto, kaj biblioteko enhavanta proksimume 1400 verkojn ĉiuspecaj.

Scanné avec CamScanner

Sed ni opinias, Kamaradoj, ke ni ne devas bedaŭri tiun prokraston: ne nur ĝi ne estas enterigo de nia propono, sed ĝi ebligas al ni vin dokumentigi kaj pligrandigos la efikon de decido, kiun vi estos prenintaj post universala kaj pripensita konsiliĝo.

Ni ne insistos pri la servoj de lingvo sufiĉe preciza, por esti alprenita de sciencistoj kiel Berthelot, patroninta la Sciencan Revuon je ĝia naskiĝo, De Saussure, kiu ankoraŭ estas ĝia direktoro, Sebert, Bouchard, Huntington, Boirac, kiuj publikigis sciencajn verkojn en Esperanto; precipe kiam tiu lingvo samtempe estas sufiĉe facila, por esti instruata al malkleruloj. Ĝi ebligos al ĉiuj niaj batalantoj ne nur tiun proksimuman komprenadon, tiun duonan uzon, kiun oni tro ofte rimarkas pri la fremdaj lingvoj en Kongresoj, sed senperan komunikon plenan kaj propramovan de la fluanta parolo, de la penso mem je naskiĝa stato, kia ĝi sin prezentas, viva kaj sincera, en frataj konfidencioj de familia konversacio. Pri la publika parolado, ĉar estas en Esperanto nek esceptoj nek malfacilecoj, oni estas certa, tie neniam esti malkorekta kaj ridinda.

Pri Esperantista Societo de Libera Penso, jen ĝiaj meritoj por via bonvola atento. Unue ĝi estas unu el tiuj, kiuj estas mone kvitaj kun la Federacio, eĉ malgraŭ malfacila situacio: ĉar ĝi postulas jare nur Fr. 2.50 kiel kotizaĵon kaj liveras al siaj membroj monatan bultenon. Ĝi havas proksimume 150 membrojn, reprezentantajn 20 diversajn naciojn. Novembre je lasta jaro, por honori la martiron, kies agadon kaj memoron ni ĵus gloris kaj kiu estis unu el niaj unuaj anoj, la Societo eldonis en broŝuro kun franca kaj esperanta teksto la pledon diritan por Ferrer ĉe la militkonsilantaro, de kapitano Galceran. Ĝi publikigas en la bulteno verkon de nia amiko Niemojewski, konfiskita en Polujo de la cenzuristaro, la Kateĥismon de l'Liberpensuloj. Ĝi atendas por grandigi sian ĵurnalon kaj pliintensigi sian agadon nur aliĝon de niaj amikoj ĉiulandaj, kiuj, antaŭpravigante la sankcion de la venonta kongreso, nepre deziros ne lasi akapari unufoje plu de l'defendantoj de l'estinto eltrovon, kiun la scienco kaj la konscienco modernaj liveris por la universala liberigo.

Ni plezure nin prezentas je la dispono de ĉiuj Liberpensuloj por pluaj informoj kaj por SENPAGAJ KURSOJ DE ESPERANTO PER KORESPONDO, kaj en la naciaj liberpensaj gazetoj.

La sekretario de la Societo LIBERA PENSO
R. Deshays, Sens, Francujo.

## LA KOMITATO
## por la societa jaro 1910-1911.

—:—

Prezidanto: S-ro O. Bünemann, Eidelstedterweg, 121 a/3, Hamburg 31.

Vicprezidanto: S-ro D-ro A. Batek, Pl zen, Bohemujo.

Sekretario-kasisto: S-ro R. Deshays, Sens, Francujo.

Redaktoroj de bulteno: La Ideoj: S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington; La liberpensa batalo: Ges. Bünemann. Presigo: S-ro F. Schoofs, 45, Kleine Beerstr., Antwerpen, Belg.

Komitatanoj: F-ino Helen Fryer, 20, Calais gate Camberwell park, London S. E.; S-ro A. Guillemin, Chalet Esperanto, Houilles (Seine & Oise) Francujo.

LE KUNVENO DE LIBERA PENSO ĈE LA SESA

Ĝi estis plej interesa interparolado de liberpensemaj kongresanoj, sed ne kunsido de nia societo. S-ro Schubert skribas, ke li tre esperas varbi multajn amerikanojn, kiam oni povos prezenti al ili vere valoran organon. Nu, la nuna reorganizo de la bulteno estas jam, kiel ni esperas, unua paŝo en tiun direkton.

LA VOĈDONO POR RENOVIGO DE LA KOMITATO

Ĝin partoprenis 50 societanoj. Elektiĝis S-roj Schubert per 48 voĉoj, Schoofs 49, Deshays 50 kiel komitatanoj; kaj kiel rezervaj S-roj Wolf 47, Fridrich 48.

**HONORMEMBRO:** S-ro J. Dons, 155, rue St-Bernard, St-Gilles-Bruxelles.

Ni jam diris en la raporto pri la L. P. Kongreso, kiel sindona kaj efektive favora al nia Esperantista Societo montriĝis tiu plej agema veterano de la belga liberpenso.

### Andrzej Niemojewski

## KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

**Tradukis Frank Sandecki**

(Daŭrigo)

Andrzej Niemojewski, la fama pola liberpensulo kies verkon ni publikigas, senĉese suferas konfiskojn kaj procesojn pro episkopaj denuncoj. Lian lastan verkon « Dio Jezuo », konfiskitan de la rusa cenzuro, germane eldonos la librejo Huber Frères en Winterthur. (Svisujo).

D. Kaj kion instruas eklezio?

R. La instruado de eklezio kondukas al ekstrema pesimismo. La homoj kreitaj de Dio laŭ lia formo kaj simileco, jam en unua generacio ŝtelas kaj mensogas, en dua jam reciproke sin mortigas, poste tiel malsuprenfalas, ke Dio devas ilin ĉiujn ekdronigi. Li restigas la plej bonajn, por ke ili multiĝu, tamen estas ankoraŭ pli malbone. Do li sendas al ili sian Filon, por ke li enkonduku ilin sur la vojon de vero. Dume ili tiun-ĉi lian filon pendigis. Do li preparis al ili inferon por ke en ĝi ili estu bakataj jarcentojn de jarcentojn.

D. Kiel vi nomus la teran potenculon, kiu kondamnus milionojn da homoj je la brulado?

R. Mi nomus lin kruelulo aŭ frenezulo.

D. Do kio estus tia Dio, kvazaŭ la plej mizerikorda, la idealo de bono ?

R. Fabelo, elpensita de pastraro por restigi malsaĝajn homojn en eterna timo kaj trompi ilin per espero de di graco ; se ili obeos al pastroj.

D. Ĉu ne estas bela aĵo la dio graco ?

R. Mi estas homo libera kaj mi bezonas nenies gracon. Se Dio ordonus al mi genufleksi antaŭ li, li estus fierulo. Fierulo faras lin ĉiu katolika kateĥismo, dirante ke Dio kreis mondon por pligranda sia gloro.

D. Do Dio ne kreis la mondon ?

R. Nur ni homoj, havantaj nian komencon kaj finon al ĉio la Saman komencon kaj finon naive alskribas. La mondo havas nek finon, nek komencon. Ekzistas nur konstanta kunmetiĝo kaj dismetiĝo de diversaj elementoj. La scienco esploras tion, porxkoni kian potencon posedas homo en la tutmondo kaj kiel al li helpi por trapasi la vivon kiel eble maldanĝere kaj feliĉe.

D. Do kio vi estas ?

R. Parteto de eterna mondo.

D. Kio konvinkas pri ĝia eterneco?

R. Maldifektemaj ĝiaj elementoj.

D. Ĉu vi ne timas morton ?

R. Mi timis antaŭe. Ĉi-tiun timon donis al mi naturo, por ke mi defendu mian vivon. Hodiaŭ mi liberigis min de ĝi, ĉar la batalilon de timo mi anstataŭis per la batalilo de scienco.

D. Sekve vi mortos ?

R. Mi mortos, kiam estos elĉerpita mia organismo, kaj ĝi ne povos pli adapti sin al la kondiĉoj de estado.

D. Vi diras tion tiel trankvile ?

R. Ĉar la prudenta homo ne lasos trompi sin per iaj timoj. Mi restos eterne en naturo, disĵetita en atomojn. Mi eliris el naturo kaj mi revenos al naturo.

D. Do vi tuta vivas tere ?

R. Pri la tereco povas opinii mia intelekto. Ĉion ekster la tereco mi lasas al naturo.

D. Kio do anstataŭas al vi la eklezion ?

R. La lernejo.

D. Kion ĝi donas al vi ?

R. La sciencon.

D. Kaj kion vi ŝuldas al ĝi reciproke ?

R. Zorgi pri tio, ke ĝi ĉiam estu sendependa.

(La fino aperos en la proksima numero).

## LA SOCIETO

### NOVAJ ALIĜOJ

Liberiga Stelo en Sens, ĉe la Kooperativa societo, Francujo.

Sekcio de la « Ligue des Droits de l'Homme », Sens, Franc.

Laborista Esperanta Grupo, S° F. Zuckarolli, B/Strohhause 31/e III, Hamburg 5, Germanujo.

S-ro Jan Jacobs, Boomsche steenweg, 444, Antwerpen.

S-ino Olga Ptacnikova, Turnow 441 !Bohemujo.

S-ro Selimir Machiela, Kod. A. Lecevica, 7 via del Municipio Rijeka (Fiume), Aŭstrio.

S-ro Julien Chevalier, 243 Vestingstr., Berchem-Antwerpen, Belgujo.

Eksigitaj : S-roj Danihelovsky, Delaroue, Felser, Mihich, Mikoch, Ŝmeic.

Entute 135 membroj.

## Kaso Septembro-Oktobro

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | 36.10 |
| Kotizaĵoj de Maranhâo | | 4.90 |
| Raczi | | 2.40 |
| Van Gansen | | 2.50 |
| Ges. O. Bünemann | | 5.10 |
| Laborista Gr. Hamburg | | 2.40 |
| Ptacnikova | | 2.40 |
| Machiela | | 2.40 |
| Schreyer 1910-11 | | 5.00 |
| Vendo de broŝuroj Pledo p. F. | | 0.70 |
| Vendo de propagandaj kartoj | | 2.30 |
| | Sume | 66.20 |

| | |
|---|---|
| Elspezoj : | |
| Paperoj kaj kovertoj | 2.65 |
| Sendo de l'Aŭgusta bulteno | 10.90 |
| Poŝtmarkoj | 2.00 |
| Preso de la julia bulteno | 18.10 |
| Sendo de broŝuroj kaj kartoj | 0.80 |
| Sume | 34.45 |

Enkaso Fr. 31.75 (Sm 12.58).

Ŝuldo por preso de l'aŭg. bulteno Fr. 21 (Sm 8.36).

Ŝuldo al S-ro O.B. Fr. 5 (Sm 2).


Estas malfermita por 1911 jaro abono de la gazeto

"LA ONDO DE ESPERANTO"

(laŭ la adreso : 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Jara abonpago 2 rubl. (2,120 sm.)

Dum la 3-a jaro de sia ekzistado tin ĉi sola ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 16-paĝaj numeroj la librojn :

1) A. RIVIER. EN RUSUJO PER ESPERANTO.

(130-paĝa originala priskribo de peresperanta vojaĝo de la Alĝera aŭtoro en Rusujo).

2) V. DEVJATNIN. PLENA VERKARO.

3-a vol. 140 paĝe libro.

Apartaj kajeroj de la ĵurn. 15 sd., de la verko de Rivier 64 sd., Devjatnin 65 sd.



Presejo Esperantista ; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.



Scanné avec CamScanner

NIP ANVERS 13

BULTENO DE LIBERA PENSO

(ANVERS)

Scanné avec CamScanner

S 548

Jaro 1910-1911. — Nº 10. KONGRESA NUMERO Augusto 1911.

# BULTENO de ★LIBERA PENSO★

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj
Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

Sekretario kasisto de la Societo : R. DESHAYS, Sens, Francujo.
Administrejo de la Bulteno : Kl. Beerstr., 45, Antwerpen.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizajojn ka artikolojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

## Al la Kongresanoj !

Karaj kunkongresanoj !

Al vi ni dediĉas hodiaŭ nian bultenon de LIBERA PENSO ; vin ja ni volas mi ne diras instrui aŭ eĉ allogi, sed igi pensi tute libere pri nia ne ĉiam ĝuste konata celado.

Neniel timu ! Ne al glavo de l'sangaj ribeloj ni tiras la homan familion, ne al ĉiuj detruemaj neoj ni alvokas korojn esperplenajn ; male, ni estas tiuj, kiuj entreprenis gardi kontraŭ perforto ĉiun ajn sinceran opinion.

Nia devizo « LIBERA PENSO » jam diras, ke ni volas fosi la kampon por libera pensado, pensado libera de ĉiuj dogmoj, de ĉiuj tradiciaj kaj komunuzaj antaŭjuĝoj, de ĉiu aŭditoritata influo.

Ne per dognoj ni volas anstataŭi dogmojn, sed per individua libera pensado sur la bazo de la praktika vivo kaj de la sincera scienco studado.

Ni estas certaj — kaj vi ĉiuj devas konsenti al tio — ke nia laborado instigos la sendependan pensadon, la sinceremon kaj la respekton por la aliaj.

Ni estas plene konvinkitaj, ke nia laborado estas plej grava kulturhelpilo kaj ke ĝi portas la benon de ĉiuj grandaj homoj, kiuj suferante pro siaj ideoj, plantis la plej belajn kaj fruktodonajn idealojn en la homajn korojn, kiel ekzemple Konfucio, Budho, Sokrato, Kristo kaj aliaj.

Sincereco en si mem ; respekto por la aliaj, jen estas niaj gvidiloj. La respekto estas la fundamento de ĉiu liberamo. Ami sian liberecon, tio certe ne bezonas esti konsilata ; eĉ multaj ĝin amas tiom, ke ne restas plu al ili ero da amo por la libereco de l'aliaj. La vera, malfacila virto de l'pensulo estas, tiel pure ami sian ideon, tiom profunde ĝin fidi ke li ruĝiĝus uzi, por ĝin admirigi, ion alian ol ĝian luman belecon, kaj malatiĝi al minacoj de la forto aŭ delogo de l'profitoj.

Venu do al ni, ĉiuj koroj sinceraj kaj delikataj konsciencoj !

Nia societo «LIBERA PENSO» — fondita en Cambridge (Aŭg. 1907) kaj regule organizita en Dresden - nun enhavas preskaŭ 200 membrojn, inter kiuj plej respektataj nomoj el la Esperantistaro kaj el la grandaj kulturaj nacioj. Jam pligrandigita, nia modesta bulteno kreskos kun niaj rimedoj ankoraŭ ne fortaj ; ĉar ĉiu ano kotizas jare nur Sm. 1.00. Sed ni fidas, por rapidigi nian prosperecon, la noblan altiron de nia bela celo.

Nune ni kore vin invitas, karaj kunkongresanoj, al akcepto ĉe niaj Antverpenaj amikoj :

Merkredon, la 23an de aŭgusto, vespere je la 8a en « Antwerpsch Koffiehuis, » Van Straelenstraat 6.

## LIBERA PENSO ĈE LA SEPA KONGRESO UNIVERSALA DE ESPERANTO

—

### NIAJ ĜENERALAJ KUNVENOJ.

La societo « LIBERA PENSO » havos du ĝeneralajn kunvenojn, kiuj okazos merkredon la 23an je la 10 1/2a, kaj ĵaŭdon, la 24 an je la 5a, en speciala salono de la Reĝa Ateneo (Akceptejo).

Ĉiuj niaj membroj estas insiste petataj ĉeesti tiujn kunvenojn, kies tagordo estas plej grava.

TAGORDO.

Laŭ la artikolo 17-a de nia regularo, skriba voĉdono post konsiliĝo en ĝenerala kunveno estas necesa por ŝanĝoj en la regularo : instruita per la antaŭaj ĝeneralaj (ironie tiel nomitaj) kunvenoj, kaj kvankam certe ĉitiu estos dece multenombra, la estraro de la Societo juĝis justa kaj oportuna apliki tiun regulon al ĉiuj decidoj prenotaj ĉe la kunveno kaj al la baloto de la komitatanoj.

Jam du proponoj estas prezentitaj por la tagordo :

1-e De Sº O. Bünemann, por interŝango de propagandiloj kun la internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj.

2-e De Dro Uhlmann, por ke la Esperantista Fako

de l'Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo uzu la bultenon de LIBERA PENSO kiel oficialan organon. Pri tiu organizaĵo, kies estroj estas du el ni, oni legu la enpresitan cirkuleron.

3-e De S°. O. Bünemann, por ke la Societa jaro Komencu la 1an de Januaro (anstataŭ en Septembro).

3-e Pri la elekto de komitatanoj, ni memorigas, ke nun siavice eliĝas S-ro Batek el Bohemujo, kaj F-ino Fryer, el Anglujo.

B. - SOLENA AKCEPTO DE LA KONGRERESANOJ-LIBERPENSULOJ ĈE LA ANTVERPENA LIBERPENSULARO
kun
PORESPERANTAJ PAROLADETOJ
por la Antverpenaj liberpensuloj,

Merkredon, la 23an de Aŭgusto je la 8a vespere
en la salono de
« Antwerpsch Koffiehuis » - Van Straelenstraat 6
(apud la Akceptejo)

**PROGRAMO.**

1.- Bonvena Parolado de S.ro ALBERT TYCK deligito de lokaj Liberpensaj grupoj

2.- Franca Paroladeto de S-ro CARLO BOURLET el Parizs, pri la utilo de Esperanto por la divastigo de Libera Penso.

3.- Flandra Propaganda Paroladeto de S-ro DREVES UITTERDIJK el Hilversum por Esperanto.

4.- Esperanta Parolado de S-ro RENÉ DESHAYS el Sens (Francujo), pri Libera Penso.

Ĉiuj membroj de la Antverpenaj Liberpensaj Societoj estas invitataj por ĉeesti ĉi-supran kunvenon. Ni esperas do ke la fremdaj samideanoj multnombre partoprenos por interŝanĝi manpremon kun la flandraj kunbatalantoj.

C.- KUNMANĜO.

Vendredon, la 25an de Aŭgusto, je la 12.45 tagmeze, okazos amika kunmanĝo de « LIBERA PENSO », en Speciala salono de «Hotel de la Couronne» Pelikaan str. 22, apud la Centra Stacidomo.

Ĉiuj esperantistaj kaj antverpenaj liberpensuloj estas invitataj por partopreni en tiu frateca kunesto.

La kosto estas Fr. 2.00 (Sm. 80) (sen trinkaĵo).

La karton por la kunmanĝo estas aĉeteblaj dum la du ĝeneralaj kunvenoj de «Libera Penso» kaj dum la solena kunveno de Merkredo.

## MORALA DEKLARO DE LA LIBERPENSULOJ.

Kiu do estas la ekstrema riproĉego ripetata kontraŭ la liberpensuloj eĉ en la solenaj kunsidoj de nia akademio : «Vi ne havas idealon, vi povas nenion liveri al la junulo, kio lin altigus super la vulgaraj deziroj».

Kvazaŭ la admono, per kiu la religio konsilas al la fideluloj zorgi super ĉio sian individuan savon, ne estus la plej intensa kulturo al konstanta egoista reirado al si mem !

Kaj jen el niaj kunvenoj de pensuloj liberaj ŝpruĉas la morala krio por amo kaj sinofero, kia ĝin resumas ĉiu medito de l'filozofa penso, de la NATURO DE L'AĴOJ, de Lukreco, ĝis la NERELIGIO DE L'ESTONTO, de Guyau.

Ne, ne estas nene, ke la liberpensuloj ne donas lokon al la sentoj de amo, de sindono, de memofero. Kontraŭe, ili plej alte ilin nobligas, ĉar ili ne kunigas al ili kiel allogaĵon la procentegan kambion per paradizaj ĝuoj.

Jee kolektiva deklaro (Kongreso de la Francaj Liberpensuloj, 1907), kiun ĉiuliberpensa junule devus memore scii tiel ke li povu tuj al ĉiu kongregacianeto diranta al li : «Vi ne havas idealon, sendiulaĉo» respondi senbezite «Oni vin trompis, dirante tion: jen kion mia familio, miaj amikoj kaj mi, ni pensas»:

Meze inter la universala batalo, kiun faras ĉiuj blindaj fortoj de l'naturo, la homa estaĵo povas fidi nur sian propran energion kaj antaŭvidon.

Kiam ĝi estas infano, la amo de sia gepatroj ĝin protektas kaj ebligas al ĝi atingi plenan disvolvon de siaj fortoj kaj racio. Feliĉe, kiam la faktaj societoj en kiuj ĝi vivas, familio, komunumo, asocio, patrujo, penetriĝas de amemo kaj solidaremo, kaj helpas per siaj leĝoj la penojn pro protekta edukado de ĝiaj gepatroj, aŭ anstataŭas ilin forestantajn. Eĉ pli feliĉe, kiam la homaro mem scios plenumi tiujn devojn !

La homa estaĵo devas do konvinkiĝi pri tiu penso, ke nur per grandiĝanta peno de bonvolo kaj amo la homoj povas rezisti kontraŭ la senĉenaj atakegoj de l'naturo.

La naturo prezentas universale la malesperigan spektaklon de la forto triumfanta ; sed en sia spirito la homo, naskita de la longa evoluo de l'organizaj estaĵoj, formis la iedon justeca, kaj sentis en sia koro la ektremon de la amo. Ĉiuj fibro de sia esto krias al li, ke la vera feliĉeco naskiĝos de la plena disvolviĝo de tiu ideo justeco, de l'kompleta florado de tiuj kernoj de amo : konstanta kaj senlima amo de l'patro kaj patrino inter si kaj por siaj idoj ; respekta amo de ĉitiuj por siaj naskintoj ; firma kaj sindona amikeco de l'membroj de sama familio kaj de l'najbaraj familioj, solidara kaj kuraĝa amikeco de samprofesianaj laboristoj reciproke ; lojala interhelpo de l'nacioj formantaj la universalan societon de la civilizitaj popoloj;tio estas unu vorte viva aplikado de tiu ordona kaj fervora homa signaldiro : VIVU POR ALIAJ.

Scanné avec CamScanner

La praktika sperto, la konstanta kaj pacienca observado de la mondo estas la sola deveno de tuta nia scienco. La homaro sin faris mem, kaj ĝia grandeco konsistas fleksi iom post iom la brutan naturon al servado de ĝia idealo, idealo de reciproka amo kaj de progreso en ordo kaj justeco.

La moralo leĝo kiu transliveriĝas de generacio al generacio, perfektigata kaj purigata, ne estas do devigo naskita de kaprico de mastro kaj sankciata per abomenaj punoj; ĝi estas kun la voĉo de la konscienco, kiu ĝin interpretas, la averto ŝizita de atavismo en niajn cerbojn, sekve de l'maldolĉaj provoj de ĉiuj, kiuj antaŭ ni batalis kaj suferis, farante la doloran sperton de siaj pasioj, kaj ekvidis por ni la vojon al la feliĉo.

Eĉ kiam tiu morala leĝo inltiges al la ekstremaj oferoj, per la belegaj ekzemploj de l'historiaj herooj, ĝi povas esti sekvata kun plena fido. La minuto de la konsciaj oferoj donas al la homa horo tiel radiantan fulmon de interna ĝojo, ke ĉiuj humilaj ĝuoj de l'ciutagg vivado aperas al ĝi senvaloraj.

Aliparte, la noblaj oferoj diktitaj al la homa koro de la klorvido de la amo profunde gravuriĝas en la kontinuan penson de l'homarl: ili pilongiĝas trans la morto, en la memoro de tiuj, kiun oni amis, kaj de ilia idaro, la daŭran postsignon de tiu unutaga floraro, kia estas vivo de homa estaĵo.

GUSTAVE HUBBARD.

KELKAJ FORMULOJ.

Ni ne devas blinde akcepti moralajn idejon instruatajn al ni, sed ilin submeti al la libera kaj senpartia ekzameno de nia racio;

Ni devas respekti la liberecon de l'aliaj kaj neniam uzi, por konverti aliajn al niajn propraj ideoj, aliajn armilojn ol tiujn de la racio;

Membroj de societo, ni devas, en niaj ideoj kaj nia konduto, limiĝi niajn dezirojn kaj niajn profitojn per tiu de la aliaj homoj, peni por kunigi ilian sorton al la nia kaj vi por ni mem vivante por la aliaj;

Hereduloj de la filozofio de l'XVIII-a jarcento, ni devas konsideri la homojn kiel egalaj je rajto kaj serĉi la rimedojn traduki tiuj rajtan egalecon en faktan egalecon;

Naskitaj en epoko, kiam kiam la disvolviĝo de l'granda industrio donis novan formon al la malnovaj ekonomiaj problemoj kaj submetis la laboristojn al la potenco de l kapitalo, ni devas, sen malamo al personoj aŭ klasoj, serĉi la rimedojn certigi la materian liberigon de ĉiuj homoj, necesegan kondiĉion de ilia intelekta kaj morala liberigo.

ALBERT BAYET.

LA RAJTO ERARI.

Estas antaŭ juĝo kredi, ke la Liberpenso estas nova perforto anstataŭgita je la alia. Ĝi ne estas la vulgara antiklerikalismo, nova maltorelemo, kolektiva devigo, kiu igas ne kredi al Dio.

Neniu devas havi la rajton nek la povon trudi ian filozofan aŭ religian doktrinon. Ne povas trudiĝi al iu ajn ami la Dion de l'katolikoj prefere ol tiun de l'protestantoj aŭ de l'judoj, aŭ la Dion de Mazzini, kiel neniu provis leĝdoni pri amo, por devigi ami brunulinon prefere ol blondulinon. Ni respektas ĉiun sinceran kredon ĉe la individuoj; ni batalas kontraŭ la sociigita superstiĉo, fariĝinta deviga povo, fortigita per privilegioj.

La dogmo devas esti forpelata el la institucioj subtenataj par la depagoj de ĉiuj: lernejo, publika helpo kaj leĝaro.

La rajto erari estas la provilo de la penslibereco. Al la eraro oni ne devas kontraŭmeti buŝligojn, karcerojn, devigan loĝeon, sed nur rifuton. Tiu libereco, pri eraro, estas la kondiĉo de la scienca progreso.

L. FURNEMONT (1904)

LIBERIGA PENSO. (Parolado en Venicio 1904)

Ni ne volas buŝligon por iu; la Liberpensa diras al neniu «Silentu! «sed kontraŭe, al ciuj «Parolu!»

Nek dogmoj, nek persekuto. sed libera ekzameno kaj diskuto pri ĉio, malfermita al ĉiuj.

Sed la batalo de l'Liberpenso ne devas daŭri nur kontraŭ la partraro: ĝi devas diektiĝi kontraŭ ĉiuj, kiuj eĉ ne kredabte al pastroj kaj Dio, volas religion kaj pastrojn, ĉar ili trovas en ili la plej bonajn ĝendarmojn... Ni devas batali kontraŭ ĉiuj perfortigaj institucioj.

Italujo estis ĉiutempe ensemita de la liberpensuloj. Nia tuta literaturo estas plena je atakaj, mokoj kaj ŝercoj kontraŭ la pastroj kaj monakoj. Sed oni devas kompreni la Liberpenson kiel devon de popola liberigo.

Voĉo persekutus la eklezion memoriganta pri tiu, kiu persekutis Kainon post la morto de Abel; «Kion vi faris el niaj fratoj, dum tiel multaj jarcentoj. kiam vi nedisputeble regis animojn, kaj ankaŭ korpojn? Sed nun ĉitiuj postulas la panon forŝtelitan, la riĉajojn elprenitajn, la racion neniigitan, la fortojn malordigitajn.....

A. GHISLERI.

## INTERNACIA ORDENO POR ETIKO KAJ KULTURO.

KARAJ GESAMIDEANOJ!

Denove Esperanto havas grandan venkon! La «Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo», kio havas reprezantojn en ĉiuj kulturlandoj kaj al kiu apartenas multaj grandaj scienculoj kaj pensuloj, enigis la enkondukon de Esperanto en sian principaron.

Ni esperantistoj nun devas trauzi tiun ĉi sukceson de nekalkulebla graveco, per tio, ke ĉiuj esperantistaj samideanoj intersiĝas pri la alta kulturmovado. Tuj kiam ni Esperantistoj pruvas al la ordeno nian intereson, Esperanto estas oficiale enkondukata.

Oni jam planas la eldonadon de la fama revuo «Dokumentoj de l'Progreso» en Esperanto, same la publikadon de epokofara artikolo de nia fama samideano Prof. Dro Forel

Scanné avec CamScanner

Sed por solvi tiujn-ĉi problemojn ni bezonas la helpon de ĉiujn esperantistajn samideanojn senkonsidere je stato, sekso, partio aŭ religio. La ordeno jam kreis specialan «Centran Oficeon per Esperanto» kaj donis al ni okazon, plenege valorigi ĉiujn preferojn de niaj idealoj. Estu do permesite al mi, en la sekvonto diri kelkajn vortojn pri la pricipoj kaj la esenco de tiu-ĉi kulturmovado.

La «Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo» estas libera unuiĝo de sociale pensantaj kaj sentantaj homoj, kiu serĉas la vereco kaj ne estas ligitaj per dogmo. — Unue ni nin publike prezentis en alvoko subskribita de granda nombro da reprezantantaj de l'internacia kulturmondo kaj kiu atentigis al jenaj du punktoj:

1e La Moderna kulturmovado reprezentita per tiom da societoj kaj organizoj bezonas komunan kunvenejon de iliaj penadoj.

2e La pure negativa laboro de l' liberpensismo povas esti konsiderata nur kiel parta laboro, nun ekzistas urĝa devo de sinteza flegado de l'animo. En tio la ordeno estas gvidata de jenaj pensoj:

Por doni al la moderna homo plenvaloran anstataŭon por la prezentaĵoj de l'tradiciaj religioj, spec. del Kristanismo, ni antaŭ ĉio devas ekvi la evolucion de l'eklezio. La forto de la prakristanismo kuŝis en ĝiaj unuaj komunumoj, malgrandaj unuiĝoj de geviroj, kiuj en plena harmonio vivadis laŭ la komuna idealo. Ni konsideras, ke la kreado de tiaj intimaj rondoj estas ebla ankaŭ kun modernaj homoj kaj modernaj idealoj. En tiu-ĉi senco niaj amikoj grupiĝas, kaj ni deziras, ke baldaŭ ĉie formiĝu tiaj «hejmoj» kiel flegejo de l'animo internen kaj kiel centroj de l'socialaj laboro kaj civilizacio.

Ni kredas, ke anstataŭo en la supra senco formiĝos nur iom post iom; tial ni konsideras la liberreligiajn dimanĉfestojn, kvankam ni ne volas forlasi ilin — ankoraŭ nesufiĉaj. Kio al ni estas necesa, tio estas pliinterniĝo, ni devas reciproke konatiĝi kiel homoj. Se ĉiuj aprobantoj al ni donas la manon al komuna laboro, tiam ni povas esperi, ke niaj «hejmoj» prezentas originon de nova homa socio. Tie ankaŭ la reprezentantoj de l'arto kaj scienco ree venos en intiman kontakton kun la «popolo», kun ni, kaj estos incitataj al nova laborado, tiel ke ni iam trovos kontentigajn formejn por niaj idealoj.

Tio al ni ŝajnas ankaŭ ontologie esti la ĝusta vojo, atingi kuniĝon de ĉiuj liberpensuloj. En la multaj organizoj ni rekonas nur la nervozan, necertan serĉadon de nia tempo. Kuniĝo estas intencita per karteligo de ĉiuj ekzistantaj organizoj, sed ni opinias, ke oni ne devus kontentiĝi pri tio, sed sisteme klopodi la kreadon de organa unueco. En niaj hejmoj ni reciproke konatiĝas, per tio ni fariĝas pli tolerantaj en nia pensado, nia vidpunkto plivastiĝas, tiel ni tutkore komprenas la tendencojn de ĉiuj modernaj movadoj. Ni ne volas konkurfaradon, ni pli bone volas helpi al vi ĉiuj kaj prepari al ĉiuj, al niaj idealoj al nia laboro, komunan fundamenton.

Per aliĝo al la ordeno ĉiu ekzistanta organizo trovas nombron da karaj gesamideanoj, kiuj volonte fervorege kunlaboras ĉe la solvado de diversaj problemoj de nia tempo. Ni petas seriozan diskutadon pri la ebleco de grandioza kuniĝo internacia, ĉar estas tempo ĉesi displitiĝi. La ordeno ne estas io rigida, definitiva, ĝi estas nur komenco, sur kiu ni ĉiuj konstruadas. En ĉiuj kulturlandoj ĝi varbis amikojn influajn, al la interkomprenigo servas la «Sciigoj» eldonataj en libera vico. Per siaj multvaleraj kunlaborantoj kaj la sukcesa alproksimiĝo al la «Internacia Ligo por la racia edukado de l'junularo» kaj la «Instituto por internacia interŝanĝo de progresaj spertoj» kaj aliaj asocioj la ordeno jam hodiaŭ ampleksas la tutan regionon de l'modernaj kulturproblemoj. Nia laborplano estas efektivebla, ĉar interne vera! Do helpu al ni ĉiuj, vi legontaj de tiuj-ĉi linioj, per via simpatio, per via kunlaboro, per mono, enkonduki nian celkonscian organizon de l'kultura laboro en la civilizitajn landojn. Kiel ni citis jam supre, la plej famaj scienculoj kaj pensuloj aprobis la principojn de nia ordeno kaj grandparte aliĝis al ĝi. Inter ili ni citas nur la jenajn nomojn:

Prof. E. Haekel Jena, Prof. A. Forel Ivorne (Svisujo), Prof. Bergman Stokholm, Prof. Broda Parizo, Prof. Freund Vieno, Prof. Una Hamburgo, Prof. Lombroso Torino, Prof. Nippold Berno, Prof. Herter New-York, Prof. Kareiev Petersburgo, Prof. Santiago Madrido, Prof. Westermarck London, Ramon J. Cayal cerbanatomiisto kaj Nobel'premiito Madrido, Gav. Lino Ferriani ĝeneralprokuratoro de Italujo (Romo), Prof. Kassowitz Vieno, Dro U. Lima Lisabono kaj aliaj, ĉiuj homoj, kies nomoj havas sonon en la scienco.

Celkonscia gvidado do estas garantiita kaj estas honora devo de ĉiu esperantista samideano subteni ĉiurilate la ordenon per sia eniro kaj tiel ne nur helpi ĝin solan; sed ankaŭ la Esperantismon; ĉar kun la definitiva enkonduko en tiun-ĉi moŝtan rondon la pozicio de Esperanto en la scienco estas ĝenerale garantiita. Oni senpage mendu regularon kaj principaron de l'ordeno el la suba oficeo.

Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo
Prez. Dro. Fr. Uhlmann, Küsnacht (Zürich Svisujo)
Sekr. A. Thomey, Avenue Bergieres 18 Lausane (Svisujo)

ANĜILO AL LA INTERNACIA SOCIETO «LIBERA PENSO»
Al S-ro René Deshays, SENS (Yonne-Francujo)

Bonvolu enskribi min kiel membron de la Internacia Societo «LIBERA PENSO». Mian jarkotizaĵon da fr. 2.50, mi sendas al vi per poŝtmandato.

Subskribo:

Nomo: ........................................

Strato: ........................................

Urbo: .................................. (Lando) ..........................

Presejo Esperantista; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

n° 56

JARO 1910-1911. — N° 11. SEPTEMBRO 1911.

# BULTENO de ★LIBERA PENSO★

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj
JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)

SEKRETARIEJO, KAJ, ADMINISTREJO:
—o—
KLEINE BEERSTRAAT, 45 ANTWERPEN.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno: 50 c. = 1 Sm.

## La Societo LIBERA PENSO ĉe la 7a Kongreso.

Jen la unua fojo, dank'al niaj Antwerpenaj amikoj precipe S-roj Schoofs kaj Weisz, kiam nia societo rivecas sian lokon en la kongresaj aranĝoj. Tial ni povas ilin kaj nin ĉiujn gratuli pro la sukceso: tial la multaj liberpensuloj venintaj foriris kun ĝoja kaj kuraĝiga impreso.

La SOLENA AKCEPTO ĉe la Antwerpena liberpensul-aro kunigis belgajn kaj alilandajn liberpensulojn, plie aliopiniajn kongresanojn. S-ro TYCK diris bonvenon en flandra improvizaĵo, tradukita de S-ro Schoofs. S-ro BOURLET, kvankam voĉe lacigita de senĉesaj paroladoj, tre klare kaj forte komprenigis, en franca lingvo, la devenon de la liberpensismo, ĝian sciencan valoron, ĝian edukan efikon, ĝiajn rilatojn kun la esperantista movado. Poste S-ro UITTERDYK aŭdigis flandre plenan kaj plej interesan studaĵon pri penslibereco kaj internacia lingvo. Fine en Esperanto S-ro DESHAYS diris la liberpensan idealon kun ĝia alteco kaj kuraĝo: respekti, defendi liberecon de opinioj eĉ kontraŭaj al la niaj, kaj oferi por la principo trankvilecon, simpatiojn, iafoje vivon mem.

Vendrede la kunmanĝo estis tiel vizitata, ke multaj ne povis trovi lokon. Neŭtile diri, ĉu gaje ŝprucadis frata sento kun plene libera sprito.

Kaj en tiu hela pentraĵo jen la necesa ombreto: proteston disdonis katolikoj kontraŭ antiklerikalaj artikoloj publikigitaj en Esperanto ĉe antwerpena ĵurnalo « DE TRIBUUN », ĉar « ĝi estas eldonaĵo de la sama domo, sur kiu oni legas «LIBERA PENSO-la frateco de la popoloj estas nia idealo», kaj en kiu konataj esperantistoj parolis hieraŭ pri Libera Penso kaj Esperanto ». Estas vere, ke la domo estis sama; sed la artikolon ni konis nur post la publikigo. Ni ne estis protestintaj kontraŭ partopreno de la esperantista flago en la procesiego kiu sekvis dimanĉe la Madonon kun milion-kosta mantelo; tamen ĝi estas konsiderata kiel unu el la konstantaj batalmanifestacioj pri klerikalismo en Belgujo.

Konstatu ni, por gaje fini la festan parton, ke en la Kongresa Balo la liberpensuloj montris, ke libera cerbo plej taŭge movas la krurojn.

### ĜENERALA KUNVENO.

Merkrede la kunveno ne povis okazi pro ŝanĝo en la oficiala kongresprogamo. Ni kunvenis ĵaŭde 24-an de Aŭg. je la 5-a. Prezidis laŭ unuvoĉa elekto S-ro Jules WOLF, rezerva komitatano, antaŭa Prezidanto. S-roj Stromboli kaj Arabeno reprezentis laŭ skriba delego la Antiklerikalan Esperantistan Grupon en Genova.

### RAPORTO DE LA SEKRETARIO-KASISTO

KARAJ SOCIETANOJ,

« La nun finiĝantan societan jaron karakterizas negranda » sed videbla kresko laŭ kelkaj direktoj.

» Unue nia bulteno ricevis decan ĵurnalan aspekton. Preferinda estas, ĉu ne? malrapida kresketado, ol morto » post brila apero. Por definitive starigi ampleksan kaj » interesan gazeton, mankas ankoraŭ nombro de societanoj, » kaj akurateco de ĉiulandaj korespondantoj: esperu ni, ke » baldaŭ ni povos efektivigi la ambaŭ kondiĉojn.

» Aliparte notinda estas la pligrandiĝo de nia societo en » Usono. dank'al la klopodoj de komitatano Schubert; kaj » kun nia liberpensa ĵurnalo certe etendiĝos la amerikanaro.

» Ankaŭ en Antwerpeno, sub gvido de Komitatano » Schoofs, okaze de la Liberpensa Kongreso en Bruselo » antaŭ unu jaro kaj de la nuna kongreso de Esperanto, » fondiĝis kaj prosperas nia loka sekcio, kiun ni devas » multe danki pro la aranĝo de niaj nunaj kunvenoj.

» Fine niaj polaj kaj hispanaj amikoj Sandecki, Linares, » Redondo, akirigis al ni aliĝojn, plie nomojn kaj efektivan » favoron de gloraj batalantoj por Libera Penso: Niemojewski kaj Lozano.

» La plej multenombre reprezentataj nacioj en la Societo

Scanné avec CamScanner

» estas Francujo kun 49 anoj, Belgujo 25, Germanujo 20, » Usono 15, Bohemujo kun Moravio 11, Hispanujo 9, » Svisujo 8.

» La financa stato, kontrolebla laŭ la monataj kaskontoj, » kaj sur la jena kaslibro, estas kontentiga, kvankam ĉir- » kaŭe 20 anoj, malgraŭ averto, ne sendis tiujaran kotizaĵon. » Restis al ni finjulie Fr. 246,95 (Sm 97,78). Tial ni povas » nestro ŝpari propagandajn elspezojn ĉe la nuna kongreso.

» Tiel nia societo povas espere regardi antaŭen, kaj fidi, » ke baldaŭ ĝi sukcesos samtempe enplanti Esperanton en » la universalan liberpensulan kampon (Universala kon- » greso de la Libera Penso en München 1912) kaj preni » ŝatindan lokon inter la esperantistaj societoj kaj ĉe nia gazetaro.

R. Deshays ».

La raporto estas akceptata. Du elektitaj ĉeestantoj kontrolas la kaslibron haj ĝin deklaris ĝusta.

La kunvenintaro konsentas decidi nur provizorajn proponojn submetotajn al skriba voĉdonado, kaj komencas la tagordon.

1. — Pri interŝanĝo de propagandiloj kun la Esperantistaj Vegetaranoj S-roj STROELE kaj WEISZ konsentas; S-ro WOLF ĝeneraligas la decidon okaze por ĉiuj societoj, kies principoj ne kontraŭstaras la niajn. Unuvoĉe aprobita.

2. — Pri la peto de Dro Uhlmann, por ke la Esperantista Fako de la Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo (kies cirkuleron oni relegu en Kongresa Numero) uzu la bultenon de LIBERA PENSO kiel oficialan organon: post diskuto kaj serĉado de solvo por la financaj malfacilaĵoj, laŭ opinio de S-ro STROELE, estas proponate, ke la membroj de la Esperantista Fako de tiu Ordeno kotizu kiel membroj de LIBERA PENSO, kaj ricevu en la bulteno lokon proporcian al ilia nombro.

3. — Pri propono de S-ro Bünemann, por ke la societa jaro komencu Januare, unue esprimiĝas malkonsentoj, kaj post diskuto oni alprenas proponon por plilongigo de la nuna jaro ĝis Januaro sen postulo de plia pago: Januare 1912 komencus la sekvanta jaro. Ĉiujare la skriba voĉdono okupos proksimume la tri aŭ kvar monatojn post la kunveno.

4. — Por elekto kiel novaj komitatanoj pro statuta eliro de F-ino FRYER kaj Dro BATEK, proponiĝas: Komitatanoj S-roj STROMBOLI kaj FRIDRICH: rezervaj komitatanoj F-ino FRYER kaj Dro BATEK.

5. — Post plenumo de la tagordo, S-ro MORTON alportas al la societo fratajn salutojn de la liberpensuloj el Usono. Jam delegita de l' Usonaj societoj ĉe la Monisma Kongreso en Hamburgo (Septembre), li estas elektita kiel delegito de LIBERA PENSO ĉe la sama Kongreso, kun S-ro O. BUNEMANN (kiu malfeliĉe estas nun malsana) kaj S-ro BOURLET (kiu ne veteris Hamburgon).

6. — S-ro SALOMON antwerpenano postulas bultenon pli facile kompreneblan por la komencantoj.

7. — La loko de la venonta Ĝenerala Kunveno povos esti ĉu Krakovo, sidejo de la Oka Kongreso de Esperanto, ĉu Munĥeno, sidejo de la Universala kongreso de la Liberpensuloj: la sekretario memorigas, ke tie ni devos klopodi por la rezultato de nia propono resendita de la Brusela Kongreso al Komisiono. Unuvoĉe oni proponas, ke la Ĝenerala Kunveno okazu en Krakovo, kaj ke Delegitaro ĉeestu en Munĥeno la Liberpensan Kongreson. En Krakovo klopodos por ni Societano ROSENSTOCK, el la Kongresa Komitato, kaj en Munĥen Societano Dro YVANSKI.

8. — S-ro STROMBOLI proponas kiel Honormembron la faman Italan Liberpensulon GHISLERI: unuvoĉe akceptite.

9. — S-ro WEISZ petas forstreki el la regularo la donaculojn membrojn: akceptite.

La skriba voĉdonado fariĝos PER BULTENOJ ĈIKUNE SENDITAJ, ĝis la UNUA DE NOVEMBRO. La elektotaj komitatanoj ekfunkcios de la I-a de Januaro dum la jaro 1912, se tiu ŝanĝo estos aprobita.

---

# La Olivarba Monto.

## de ALFRED de VIGNY (1799-1863).

I.

Jen sola tra nokto Jesuo iradis:
Li blanke vestita similis mortinton;
Kaj liaj disciploj dormadis malsupre
Ĉe la olivarboj de vento batataj:
Jesuo paŝadas, tutsame tremanta,
Kun morta malĝojo, mallumaj okuloj,
Kun frunto klinata kaj brakoj plektitaj,
Ŝajnante ŝtelisto kaŝanta rabaĵon;
Ŝtonaron li konas pli bone ol vojon,
Kaj en Gethsemani subite li haltas.
Li genufleksinte, kun frunto ĉe l' tero,
Ĉielon rigardas vokante: « Ho Patro! »
— Ne lumas ĉielo, kaj Dio silentas.

Mirante li staras, reiras paŝege,
Puŝante la branĉojn en vento. Frostanta
Sangŝvito gutete defluas de l' kapo.
Li paŝas malsupren, kaj krias timege:
« Ĉu vi ne alvenos por preĝi maldorme? »
Sed morta dormado premegas disciplojn.
Eĉ Petro al voĉo de l' Majstro surdiĝis.
Do supren la Filo de l' Homo reiras;
Kaj kiel Egipta paŝtisto, ĉielen
Li serĉas anĝelon en stelo brilantan.
Sed nubo funebra, vidvina vualo,
Ĉirkaŭe per taldoj kovradas dezerton.
Nun rememorante la longajn suferojn
De tridek tri jaroj, Jesuo homiĝis,

Kaj koron mortulan ekvenkis timego.
Li frostis. Kaj vane trifoje li vokis :
« Ho patro ! » Nur vento respondis al krioj.
Li falis sur sablon sidiĝe ; malĝojo
Lin home pri mondo kaj home pensigis.
— Kaj tremis la tero : ĝi sentis pezege
Falantan Savonton sub Mano Kreinta.

II.

Kaj diris Jesuo : « Plu vivi min lasu,
Ho Patro ! Ne fermu tro frue la libron !
Ĉu vi nun ne sentas tutmondon, homrason
Kun mi suferantan je karno tremanta ?
Ĉar timas la Tero vidvine soliĝi,
Sen tiu diranta la novan parolon,
Kaj ĝia dolora deziro ricevis
Nur unu Divorton, el buŝo la mia :
Sed estis la vorto kun tia dolĉeco
Ke mi ebriigis la genton homaran
Per guto de vivo kaj forto dieca.
Kun brakoj tendataj dirante : « Frateco ».

Ho Patro, se pene mi faris la taskon,
Se dion mi kaŝis sub formo saĝula,
De l' homa ofero se prezon mi ŝanĝis,
Anstataŭ la korpojn prenante spiritojn,
El ĉio tirante simbolon idean,
El lukto parolon, el oro moneron,
El ruĝa sangondo la brilan vinfluon,
El membroj de l' karno la macon blankegan ;
Se mi dupartigis la tempojn, jen sklavaj,
Jen poste liberaj, kaj savas Estinton,
Mi petas de mia korpsango dolora
Ni verŝu duonon por lavi Estonton !
Ho Patro savonta, tuj ĵ tu, antaŭe,
Duonon de tiu senkulpa korsango
Sur kapon de l' homoj venontaj dirante :
« Ni povas por ĉiuj mortigi justulon ».
Jes iam — ni scias — je l' aĝoj venontaj
Maldolĉaj tiranoj kun kvazaŭsaĝuloj
Konfuzos animojn de ĉiu nacio
Falsante la sencon de la Reaĉeto.
Ho ve ! mi parolas : jam mia parolo
Venene ŝanĝiĝas en la parabolaj.
Forigu ĉitiun kalikon, amaran
Ja pli ol absinto kaj akvoj de l' maro.
La vergoj venontaj kaj krono kun dornoj,
La najloj ĉe manoj, la lanco en bruston,
Kaj tuta la kruco atende staranta
Ne tiom min Patro, ne tiom timigas !
La Dioj bonvole falantaj sur mondojn
Postlasu en ili nur signojn profundajn ;
Kaj se mi surpaŝis la globon mankplenan,
De kiu senĉese la ĝemo min vokis,
Ĝi estis por lasi post mi du Anĝelojn,
De kiuj paŝsignojn kisados la homoj,
Certecon feliĉan kaj fidan Esperon,
La paĉon ĉielan kun ambaŭ ridetoj.
Sed mi tuj ĝin lasos, la teron mizeran,
Nur iom levinte la nigran mantelon
Ĝin larĝe kovrantan per faldoj fatalaj,
Tenatan de l' Dubo kaj de la Malbono.
Malbono kaj Dubo per vorto disfalus.
Vi ilin antaŭe sciadis, permesis :
Ha lasu, ke mi vin absolvu : ĉar tia
Akuzo el ĉie premadas kreiton !
Sur sian stombŝtonon tuj staru Lazaro :
La mortan sekreton li fine ellasu.
Ni lin memorigu pri ĉio vidita,
Li diru ! — Nu kio estadas, finiĝos,
Sur kio Sinjoro konstruis Naturon,
Kaj kion al ĉio ĝi donas, aŭ prenas,
Kaj kiel ĝi mute ĉielen parolas,
Kun kia amego kaj ĉastaj kuniĝoj ;
Kaj kiel ja ĉio disiĝas, revivas,
Kaj kial kaŝiĝo kaj kial aperoj ;
Ĉu astroj ĉielaj laŭvice provataj,
Simile al tiu, kulpiĝas, saviĝas ;
Ĉu tero por ili aŭ ili por tero ;
Ĉu vero ĉe fabloj, ĉu lumas mistero,
Scienco nescias, malpravas racio ;
Kaj kial animo en ĉenoj sopiras ;
Kaj kial neniu mezema vojeto,
Nur vojo enua de l' paca fiĝojo
Kaj vojo rabia de l' akraj pasioj,
Nur la letargio kaj la konvulsioj ;
Kaj kial la Morto minace pendadas,
Kaj tremas Naturo sub glavo frapema ;
Ĉu justo kaj bono, maljusto, malbono
Nur estas flankaĵoj en cirklo fatala,
Aŭ de l' Universo mem ambaŭ polusoj,
Portantaj ĉielon kaj teron sur ŝultroj ;
Kaj kial Spiritoj Malbonaj triumfas
Dum virto suferas kaj mortas infanoj ;
Nacioj ĉu estas virinoj gvidataj
Per ora stelaro de l' diaj ideoj,
Aŭ stultaj knabinoj sen lampoj en nokto,
Interfrapiĝante sen celo irantaj ;
Kaj dum la perea horloĝo de l' tempoj
Finverŝos la lastan de siaj sableroj,
Ĉu unu rigardo de viaj okuloj,
Ĉu mia korĝemo, ĉu signo de l' kruco
Malfermos la ungojn de l' Punoj eternaj,
Lasigos libera la homan kaptaĵon
— Ja ĉio klariĝos se scios la homo
De kie li venas kaj kien li iros ».

III.

Do tiel Difilo alpreĝis Dipatron.
Li ree sin klinas, atendas espere,
Sed supren reiras dirante: « La volo
La via, ne mia, fariĝu por ĉiam ».
Profunda teruro, timego senlima
Pliigas turmenton de l' agonianto:
Li longe rigardas, serĉadas senvide.
Marmore funebra ĉielo restadis;
La Tero sen heloj, sen astra radio,
Sen lumo anima, jam kiel ankoraŭ,
Fremadis. — Ĉe l' arboj li aŭdis paŝadon,
Kaj vidis ĉirkaŭe kun torĉo Judason.

SILENTADO.

Se vere, ĉe l' sankta Biblia ĝardeno,
La Filo de l' Homo parolis laŭ Skriboj,
Se blinda kaj surda por krioj de l' tero
Ĉielo nin lasis, abortan kreaĵon,
Justulo fiere malzorgos foreston,
Kaj de nun respondos per alta silento
Silenton eternan de l' muta Diaĵo.

Trad. R. Deshays.

# LA SOCIETO

F-ino Marie Meunier, I rue de Vernueil, SENONCHES (Eure & Loir) Francujo, kiu sub la nomo de sia frato S-ro Emile Meunier, fidela societano ĵus mortinta, sendis al LIBERA PENSO Fr 50, estas enskribita kiel ĉiama membro, kun koraj kondolencoj kaj dankoj de ni ĉiuj.

NOVAJ ALIĜOJ

S-ro E. Calvo, San Miguel, 146, Habana, Cuba.
S-ro E. Cros, I, rue de la Cloche d'Or, Perpignan, Franc.
S-ro J. Habert, 6 rue Edgard Quinet, Montrouge (Seine) Fr
Centro Instr. Republicano, 68 Atocha, Madrid, Hisp.
S-ro Roman Vogel, 5 st. szklana, Piotrkow, Pollando.
S-ro Casimiro Garcia, 4 str. Zapateria, La Arboleda. Vizcaja, Hispan.
S-ro Paŭlo Gottgetreu, 13 Rundestr. Hannover, German.
S-ro J. Erichsen. Sudebrarhupholm, Kreis Sleswig, German.
S-ro L.W. Colson, P.O. Box 489, Milan, Indiana, Usono.
F-ino J. E. Hamand, Schaller, Jowa, Usono.
S-ro Daniel Jones, 54 Robert st. Ynysybwl, Glam, Angl.
J. L. Bruyn, Prinsestraat 48, 's Gravenhag, Nederlando.
Antiklerikala Esp. Grupo, 61-12 Via del Colle (S° G. Rossi) Genova, Ital.
S-ro Gaston Barat, 6 boul. Louis XIV. Lille, Francujo.
S-ro Henry Meulen, 19 Boscombe rd, Shepherds bush, W London, Anglujo.
F-ino Adam, St Blaise près Neuchatel, Svisujo.
S-ro Antonin Jakeŝ, Nova ul. 19, C. Budejovice, Bohem.
S-ro H. A. Collot, 51, rue de la République, Arras, Francujo.
S-ro Lobbedez, 84 rue de Bapaume, Arras, Francujo.
F-ino E. Morawitz, Burgring 12, Graz, Aŭstrio.
F-ino Marianne Toldt, Brockmanns, 18, Graz, Aŭstrio.
S-ro Gustav Teltschik, Universitato 14, Graz, Aŭstr.
D-ro Wilhelm E. Dietl, Nibelungeng. 63, Graz. Aŭstrio.
S-ro Souchay, 134 Boul. Exelmans, Paris, Francujo.
S-ro Michele Arabeno, Salita Prione 27-4, Genova, Italujo.

Entute: 196 membroj.
Eksiĝis: Perceval, Wurmser, Ritz, Vaucher, Dublange

——

ŜANĜITAJ ADRESOJ.

S-ro F. Blangarin, 115, rue Manin, Paris, XIX°, Franc.
S-ro Kerr, 1135 Inca str., Denver, Colo. Usone.

——

LITERATURA KONKURSO. Monoferado, 3-a listo.

| | | |
|---|---|---|
| S-ro Schubert kaj F-ino Hamand | Fr 5.— | |
| S-ro Niedzwiedszki | 0.60 | |
| S-ro Redondo | 1.— | |
| F-ino Rouff | 1.— | |
| S-ro Raiczi | 2.40 | |
| S-ro Curchod | 4.90 | |
| | 14.90=Sm | 5.90 |
| | | 2.60 |
| | Sm | 8.50 |

——

La staton de la societa kaso estos publikigata en la proksima numero de la bulteno.

ANONCO. — La Societanoj de Esperantista Antiklerikala Grupo en GENOVA (Italujo), Vojo S. Giuseppe 31/3, deziras korespondi Esperante kun Samideanoj Liberpensuloj de ĉia lando.

LINGVO INTERNACIA
CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato
— La Plej Malnova el Ĉiuj Gazetoj Esperantistaj —
Fondita en 1895
La Plej Enhavoriĉa! 48 PAĜOJ da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.
La Plej Malkara! 5 FR. (2 Sm.) Abonprezo por UNU JARO
Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacèpéde, Paris.

Presejo Esperantista; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

Scanné avec CamScanner